

1987 junio
80a jaro
n-ro 978 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

esperanto

ISSN 0014-0635

80

Jubileanta movado havas jubileantan revuon

Vi trovos,

interalie, ke ni ŝatas grafikaĵojn. Eble vi trovos iom fremde scienca tiun emon. Ĉu vi sopiras je belaj pejzaĝoj aŭ ridetantaj esperantistoj sur la koncernaj paĝoj? Nu, ni ne klopodos konvinkadi vin pri niaj estetikaj principoj... Sed ni volas atentigi vin pri unu aparta ĉarmo, kiun havis grafikaĵoj pri Esperanto lastatempe: post jardekoj de zigzaga ondado, tiuj linioj kaj stangetoj nun montras rimarkindan emon ŝpruci supren. Rigardu ilin kaj kuraĝiĝu. Kvankam longas la vojo irenda, ankaŭ longas la vojo jam paŝita. Feliĉan kaj esperoplenan legadon, do — ĝis la jubilea julia!

Enhavo

- 101 Okdek jarkolektoj de la revuo "Esperanto": "Pri la vivo kaj vivemeco de l' entrepreno esperantista." (Mark Fettes)
- 104 Trarigardo de la Esperanta gazetaro: Distraj horoj en la kancerklinika atendejo (Ĵak Le Puil)
- 106 Esperanto en radio: Ĝuu sennuban eteron! (Günther Becker)
- 108 Renkontiĝoj: Rekorda sveda kongreso (Börje Andersson); Fervojistoj unuaj en Pollando; Franca Esperanto-muzeo inaŭgurita
- 109 Diskuttemo: "Universala tradukreto": ĉu realigebla iniciato? (C. Bodson)
- 110 Bibliotekoj: Tra densa polvnubo briletas la celo... (Roĝero Blaine)
Novaj projektoj de Eduka Fondaĵo "Carson" (A. Whittaker)
- 111 Kulturo: Urala florperiodo (Mark Fettes)
- 112 Iom pri K.E.B. (Aleksander Korĵenkov)
- 113 Reagoj: Respondkuponoj ne senproblemaj (Constant Borremans); Esperiga marta (W.D.B. Hackett); Malkontento pri "satisfakcio" (F. Roose); Ankoraŭ post cent jaroj (Eskil Svane); For la lamentadon! (Franz Braun); Temas ne nur pri lingvo, sed pri valorsistemo (Wolfgang Gunther)
- 114 Recenzoj: *La suferoj de la juna Werther* de Johann Wolfgang von Goethe/trad. Reinhard Haupenthal (Klaus Schubert); *Ĉina-Esperanta vortaro* (Pekino) (D.K. Jordan); *Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!* de Stefan MacGill (Claus J. Güntel)
- 116 Oficiala Informilo
- 117 Kongresa Komunikado de la 72a UK en Varsovio
- 118 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
- 120 Nekrologoj; Anoncetoj

La kovrilo

Ĉu vi jam rimarkis, ke ankaŭ nia revuo jubileas ĉi-jare? Okdek jarkolektoj ja meritas toston — sed ĉar la redaktorojn ni festas en la ĉefartikolo, ĉi tie ni tostas vin, la legantojn. Sen vi eĉ ne unu jarkolekto estus ebla — dankon pro via intereso kaj subteno! Cetere, tostojn oni kutime reciprokas... Pensu aparte pri niaj amatoraj kolegoj, kiuj ankaŭ meritis lokon ĉi-numere. Inter tiu amaso da revuoj traktitaj de Ĵak Le Puil, ĉu ne kuŝas iu kiu logus vin al ekabono? Jen kio estus la plej sincera kaj valora tosto viaflanke. Sanon!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Legata en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakvtilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝir-konto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

"Pri la vivo kaj vivemeco de l' entrepreno esperantista"

(Berthelot, *Esperanto* n-ro 1, 1905)

Por inde marki ĉi tiun duoble jubilean jarkolekton, ni iom cerbumis inter la alternativoj. Ja ne eblus trairi ĉiun jaron el tiuj okdek, eĉ supraĵe! Iujn ideojn ni cetere rezervas por la mila numero, kiu venos post du jaroj... Finfine ni surmetis kaskon, prenis lampon kaj pioĉon, kaj eniris la mallumajn profundojn de la biblioteko por prezenti al vi la jenon: esploro pri ĉiu deka jarkolekto, la tiutempaj enhavo de la revuo, emoj de la redaktoro, similoj kaj kontrastoj kun nia hodiaŭa organo. Se ni elektis emfazi la rolon de la homoj, kiuj en diversaj epokoj okupis nian seĝon, kaj iom kritikeme rilatis al ili — nu, ne komprenu tion kiel pretendon de perfekteco niaflanke!



Nia revuo ekpaŝis sur la mondan scenejon la 18an de junio 1905, en la formo de granda (A2-formata) folio, falde duonigita. Unuflanke troviĝis franca teksto, aliflanke Esperanto: ĉar la celo de la eldonanto, Paul Berthelot — tiam nur 24-jara — estis, "ke nia gazeto estu ĉie, en vendejoj, legejoj, kunvenejoj; ke oni ĝin trovu sur la ŝipo, en la stacidomo de l' fervojo, en la kafejo, sur la strataj kioskoj, en la manoj de l' promenantoj..." Por atingi tion, Berthelot kaj redaktoro Charles Lambert klare priskribas sian redaktan politikon en la franca versio: "Ni ne transformiĝos en bazaristojn, kiuj reklamas laŭtkrie siajn varojn kaj klopodas superi la voĉojn de la konkurantoj kaj skeptikuloj. Esperanto venkos per siaj realaj virtoj, sen ke ni bezonus elpensi iluziajn..." Kaj: "Traduki en Esperanton ĵurnal-artikolon, kunmeti en ĝi ordinaran informrubrikon, ŝajnas al ni laboroj pli gravaj — el la vidpunkto de ĝia estonteco kaj disvastiĝo — ol la plej ellaborita traduko de novelo de Daudet aŭ tragedio de Corneille."

En la Esperanta parto oni trovas informojn pri la unua UK en Bulonjo, kaj pri la jamaj provoj fondi internacian organizaĵon: du aferoj kiuj grave ligiĝos kun la estonteco de la revuo, post ĝia aĉeto fare de Hector Hodler...

10 (1913)**ESPERANTO**

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Saltinte naŭ jarojn post tiu unua numero, ni trovas nin en jaro de krizo: 1914, kiam la revuo fakte aperos nur ĝis julio. Hazarde, tamen, pro eraro en numerado, la oficiala "deka jarkolekto" komenciĝas je la 20a de junio 1913, do en nur la naŭa jaro de apero. (Oni finfine korektos la numeradon en 1917-1918, kies jarkolektoj portos la saman ciferon.)

Jen revuo pli proksima al tiu, kiun ni konas nun. Po-16-paĝa, kun la nomo de UEA sur la kovrilo. Tamen ankoraŭ duonmonata, t.e. 32 paĝoj en monato: kiom da laboro tio devas postuli! Redaktoro ne aperas laŭnome, sed oni povas esti certa ke Hodler, la juna direktoro de UEA (ĝuste 26-jara en 1913 — saluton Hector!) plenumas ankaŭ tiun rolon. Kiamaniere? Nu, oni tuj rimarkas, ke "esperantismo" (tiel!) ricevas nur parton de la disponebla spaco. 4-7 paĝojn en ĉiu numero plenigas la rubrikoj "Nuntempaĵoj" kaj "Socia vivo": signoj pri la socia ligiteco, kiun Hodler dum sia tuta, tro mallonga kariero daŭre alcelos. Nur 1-2 paĝojn ricevas "Literaturo", sed tio jam montras progreson de la frua *Esperanto*...

La cetero de la revuo enhavas en ĝerma formo niajn nunajn rubrikojn Loke-Fake-Persone, Anoncetoj, Oficiala Informilo (kiu lasta jam portas tiun nomon). Tiuj rubrikoj efektive restos konstantoj tra ĉiuj flusoj kaj malflusoj: cinikulo povus diri, ke ili konsistigas la esencon de la organo de UEA! El la tieaj informoj oni povas konkludi, ke la esperantistaro en 1913 sufiĉe similis la nunan laŭ diverseco, intereso, sintenoj al Esperanto kaj al la mondo... Estas bedaŭrinde ke Hodler ne utiligis sian revuon por movado-temaj artikoloj, nur aperigante ĉerpaĵojn el aliaj gazetoj. Sendube li mem posedis sufiĉe modernan aliron al tiaj temoj. En jarfina artikolo li skribis: "Plej granda baro estas nia propra inerteco. Ĝi malgrandiĝos kiam ni konscios, ke la triumfo de Esperanto ne estas io estonta kaj absoluta, sed ke ĝia triumfo konsistas jam nun en tio, ke ĝi ekzistas kaj utilas." Komparu kun la artikolo de Vaŭn Fraŭsin en la aprila numero!

20 (1924)**ESPERANTO**

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Jen nova redaktoro, post la tragika morto de Hodler en 1920 — Edmond Privat, kies ĉefartikoloj tra la jaroj formos fascinan spegulon de UEA kaj la Movado. Sub lia redaktado la revuo fariĝas multe pli "esperantisma": ofte aperas artikoloj pri kampanjoj kaj konferencoj ĉe Ligo de Nacioj, kun aliaj internaciaj organizaĵoj kaj ankaŭ sur loka nivelo. Tamen, ankoraŭ 2-3 paĝoj en ĉiu 16-paĝa numero (nun monata, de post 1914) estas dediĉitaj al ekstermovadaj temoj ("El scienco kaj naturo", "Socia vivo" ktp). La personaj ŝatoj de Privat sendube speguliĝas en la pli granda emfazo pri literaturo kaj filozofio (kune po 4 aŭ 5 paĝoj). Cetere, la nova fenomeno de la radio havas oftan rubrikon (ĉu vi sciis, ke la unua sukcesa alsendo de Novjorko ĝis Tokio estis en Esperanto?). Kaj ekaperas fotoj, kvankam sporade.

Kutimo kiu delonge forpasis el nia hodiaŭa revuo (sed pluvivas ekzemple en *Sennaciulo*, kiu mem fondiĝis en tiu jaro 1924) estas la aperigo de ampleksaj protokoloj pri la Komitataj kunsidoj en la Universala Kongreso (ĉi-foje la deksesa, en Vieno). Kaptas la okulon la nomo Zamenhof inter la intervenantoj: temas pri Lidia, tiutempe aktiva en la studenta fakrondo de UEA, kaj pri ŝia patrino Klara, fidela aktivulo ankoraŭ post la morto de ŝia edzo. Ŝian nekrologon oni legos sur la decembra kovrilpaĝo, nur kvar monatojn poste.

Inter tiuj aferoj, kiuj ja memorigas pri la hodiaŭa revuo, estas mallonga frazo en la novembra numero: "Ni klopodas, ke la Jarlibro 1925 aperu frue (daton ni ne konigas por ne revoki nian promeson!)..."

Ioma ŝanĝo en la kovrilo tamen ne indikas grandan ŝanĝon en enhavo: la nelaŭtebla Privat restas ĉefredaktoro, almenaŭ ĝis la 26a UK en Stokholmo kie lia ne-reelekto enkondukos la finan stacion de krizo en la antaŭmilita UEA. Estas kortuŝe ironie, ke li komencas la jaron per ĉefartikolo titolita "Renoviga jaro", parolante pri "nova epoko de nia movado, liberigita de la tempoperdaj organizaj diskutoj"...

Ja la helaj kaj esperplenaj jaroj de la lasta jardeko iom post iom cedis al pesimismo kaj la certeco de venonta milito, kaj tiuj ŝanĝoj trovas spegulon en la paĝoj de Esperanto. Sed ne tian, kian oni povus esperi. Malaperis la prisoci-aj rubrikoj el la 16 paĝoj: literaturo, turismaj artikoloj kaj multaj multvortaj diskutoj pri internaj aferoj de Esperantujo okupas preskaŭ la tuton. En siaj lastaj ĉefartikoloj Privat parolas rezigne pri sia antaŭvido, ke "la stato de la mondo daŭre similos al mara ventego dum tuta nia generacio", kaj nur post tiu "doloriga nasksufero" Esperanto "povos ludi sian decidan rolon".

(bedaŭrinde), ĉar spite la redaktadon de Hans Jakob el Ĝenevo oni daŭre kunmetas ĝin en Heronsgate, Anglio. La 16 paĝoj nun sidas en ekstera kovrilo, uzata por anoncetoj kaj anoncoj; interne, mallongaj recenzoj, informoj, poemoj, "enigmoj" kaj oficialaĵoj iel sukcesas okupi preskaŭ la tuton. Jen certa signo pri la bezono de renovigo en la Asocio: neniam antaŭe ĝia organo reduktiĝis al tia simpla informilo. Iom post iom ekde 1950, la revuo de Hans Jakob realprenas iun karakteron: sed pli pro la tiutempa ĝisfunda rekonstruo de UEA gvidata de Ivo Lapenna, ol pro videbla ŝanĝo en redakta politiko...

Feliĉe oni ne povas diri la ĉi-suprajn vortojn pri la revuo dek jarojn poste, kiam ni trovas nin ĉe la komenco de "moderna" epoko. De novembro 1955 redaktas la revuon William Auld, kiu apenaŭ bezonas prezenton al niaj nunaj legantoj. Kiel oni atendus, sub lia redaktado la revuo alprenis certan literaturan guston, kvankam verŝajne ne sufiĉe por kontentigi lin: en aprilo 1958 aperos 72-paĝa "beletra" kromnumero!

La "epoko-faraj" redaktoroj de Esperanto: nur ses homoj (por precizigi: ses viroj) respondecas pri 90% de la vivo de tiu 80-jara periodaĵo. En ĉi tiu panteono, kvin jaroj de malfruaj noktoj (interrompitaj pro malsano) sufiĉis nur por atingi la lastan lokon (Auld); la kompatinduloj kiuj traŝvitis du-tri jarojn apenaŭ sukcesis perlabori piednoton... Laŭvice: Hodler (1907-1920); Privat (1920-1934); Jakob (1936-1955); Auld (1955-1958, 1960-1962); Sadler (1963-1974); Milojević (1974-1984). Inter la mankantaj estas Berthelot/Lambert (1905-1907), Kreuz (1934-1936), Stuttard (kun Jakob, 1947-1954), Rossetti (1955), Zacho/Rasmussen (1958-1960), Ŭusink-Nagata (kun Sadler, 1970-1973), Sutton (1984-1986) kaj la nuna redaktoro.



Kontraŭ la pasiveco de UEA kaj ĝia organo levas sian voĉon Lidia Zamenhof en la lasta numero de 1934. "Ni devas apostoli tra la mondo ne nur la lingvon Esperanto, sed ankaŭ tion, por kio ĝi estas kreita — la interpopolan interproksimiĝon kaj simpatian. Kaj ni neniel laciĝu aŭ senkuraciĝu en tiu batalo, ĉar ĝi estas por ni batalo pri vivo aŭ morto." Sed jen du paĝojn poste, artikolo titolita "La germana vidpunkto pri la rasproblemo", subskribita de "E.W.", heroldas la venontan katastrofon...

Dek tri jarojn poste, preter kataklismoj en kaj ekster la Movado, ni trovas nin en ŝlosila jaro: tiu de la unuiĝo de UEA kaj Internacia Esperanto-Ligo. La bindita jarkolekto en la Biblioteko Hodler komenciĝas per la 11-a jarkolekto de *Esperanto Internacia*, kiu efektive transprenis la rolon de *Esperanto* dum la vivo de IEL. Estas nur ekde majo, post la subskribo en aprilo de kontrakto inter UEA kaj IEL, ke nia nuna revuo reaperas kiel organo de monda organizaĵo. Sincere dirite, *Esperanto Internacia* estas plejparte sufiĉe teda — kaj cetere redaktata de tute anonima redaktoro! La ekde-maja revuo tre similas

Sed cetere, jen jam la diverseco kaj kvalito kiuj fariĝos normoj por *Esperanto*, alstrebatas se ne ĉiam atingataj...

La revuo tamen ne tiom similas al la hodiaŭa en detaloj. Konstantaj rubrikoj inkluzivas iujn nun forpasintajn: La Juna Vivo, redaktata de Nicola Minnaja, kun plaĉe internacia enhavo; CED-rubriko (Centro de Esploro kaj Dokumentado), sub redakto de prof. Lapenna, kie aperas interesaj statistikaj esploroj k.s... Pli oftas la radio-rubriko, jam tiam modele redaktata de Georges Larglantier; Loke-Fake-Persone embrias kiel "Tra la Mondo"; Oficiala Informilo emas forpreni almenaŭ du paĝojn el la 18 disponeblaj, sed kompanse la litertipo de preskaŭ ĉiuj artikoloj estas rimarkeble malgranda kompare al niaj nunaj kutimoj. (Jen konata redaktora truko por kontraŭlukti la oficialaĵojn, kiun vi rimarkos ankaŭ en ĉi tiu artikolo!)

Ĝenerale, do, el la revuo de Auld oni enspiras impreson de kulture maturiĝanta movado, pli ol en iu ajn antaŭa jardeko. Nur du mankoj okulfrapas: la forta emfazo pri eŭropa kulturo (ja ankoraŭ hodiaŭ estas malfacile eviti tion), kaj la foresto de artikoloj, kiuj emfazus la socian rolon de Esperanto kaj la movado — eĉ malgraŭ la kunlaboro kun Unesko. Oni povus diri, ke la revuo sekvis la filozofion de la Raŭma Manifesto pli ol dudek jarojn antaŭ ĝia proklamo kiel "nova" doktrino!

60 (1967)



"Ĉu la koncepto de tradukado per maŝino estas kontraŭdira en si mem?" Tiel tekstas la atentokapta demando sur paĝo 2 de ĉi tiu jarkolekto, kiu jam atentigas ke sub redaktoro Victor Sadler oni ne preteratentos evoluojn en la ekstera mondo. Fakulo Klaus Schlüter cetere respondas, kvar paĝojn poste: "Kiel konkurenco al la Internacia Lingvo la tradukmaŝino dum ankoraŭ longa tempo restos nura sonĝo." Prave kaj saĝe: sed eĉ li ne antaŭvidis, ke post dudek jaroj Esperanto rolos kiel esenca ero en tia esplorprojekto!

Denove ŝanĝo de redaktoro alportis ŝanĝojn en enhavo. Sub Sadler, lingvistikaj kaj esperantologiaj artikoloj regule aperas, kaj oni cetere rimarkas pli grandan emfazon pri demandoj de instruado kaj informa strategio. Recenzoj kaj literaturo ŝrumpis ĝis 1-2 paĝoj (ankoraŭ el 18), spite la propran literaturemon de la redaktoro (dubantoj legu *Memkritiko!*). Preter tiaj ŝanĝoj en emfazo, la revuo daŭrigas la firme establitan tradicion de diverseco: La Juna Vivo aperadas sub la redakto de Hans Bakker, "Laŭfa-



k.a. Jen vere freŝa rigardo al la loko de Esperanto en la mondo, kaj al la rolo de ĝia ĉefa revuo.

Tamen ne ĉio estas super riproĉo. Oni rimarkas certan kapricon en la enhavo, kiu povas subite kaj ne-atendite salti trans oceanojn kaj temo-kampojn, kaj same subite reen: salatojn oni povas ŝati, sed ne nepre kiel konstantan dieton. La redakta stilo foje emas al retoriko pli ol komentario: la cirkonstancoj ne ĉiam meritas tian helan optimismon! Sed jen, neniuj perfektas en ĉi tiu mondo...

80 (1987)



Per tuta hazardo, la komenco de ĉi tiu jarkolekto koincidas kun la ekposteniĝo de nova redaktoro: tial estas iom frue por konstati, ĉu la unuaj ses numeroj fidele respegulas pli longedaŭran politikon... Tamen jam videblas, ke ankaŭ ĉi tiu novulo kunportas siajn emojn kaj preferojn. Interesa eksperimento estas la dediĉo de pluraj paĝoj en ĉiu numero al unuopa temo: unu rezulto estas, ke la revuo donas impreson pli "fakan", malpli "novaĵan".



ke" kaj "Laŭlande" restas konstantaj, kaj kompreneble Kongresa Komunikado kaj similaj oficialaĵoj ne malaperis, kiel ajn redaktoro povus foje sopiri tion!

70 (1977)



Antaŭ nur dek jaroj: kaj sub la redakto de Simo Milojević, kiu transprenis la seĝon de Sadler en 1974, la revuo atingas novajn altojn de viglo kaj vario. Hodiaŭa leganto facile rekonas la bazan formon de nia nuna organo... Plej karakteriza estas la redaktora angulo sur la interna kovrilo, kie "Vi trovos" kaj "La kovrilo" sprite prilumas tiun kaj alian flankon de la numero. Oni cetere tuj rimarkas la grafikan revolucion, kiu alvenis kune kun la nova redaktoro. Koloraj paĝoj, ilustraĵoj pli oftaj kaj pli grandaj, de temp' al tempo avangardaj eksperimentoj pri enpaĝigo: se ne perfektan, oni almenaŭ trovas revuon kiu vere taŭgas por montri al la ekstera mondo.

Ankaŭ la emfazo en la revua enhavo ŝanĝiĝis. Ni rigardu la ĉefartikolojn tra la jaro, kiuj pritraktas temojn kiaj lingvo-problemoj en UN, la problemoj de la Movado en la Tria Mondo, fakaj periodaĵoj en Esperanto, la programo de Unesko rilate komunikadon, la Universitato de UN

Kontribuas al tiu impreson ankaŭ la unueciga enpaĝigo (ĉu sub influo de iu nacilingva gazeto?) — kvankam eĉ post ses monatoj iuj detaloj ŝanĝiĝas de numero al numero!

Cetere ne mankas aferoj, kiujn oni povus plibonigi... Ni esperu vidi iom pli da ilustraĵoj, ekzemple, ol en la aprila kaj maja numeroj, kaj ke reaperos tiuj petole spritaj komentoj, per kiuj antaŭa redaktoro ornamis ilin. Ja oni ne volas revuon tute seriozan! Apud la recenzo-rubriko, iom pli da kulturaj eroj estus bonvenaj: ne tro, sed sufiĉe por aldoni sian spicon. Kaj ĉu ne estas tempo, ke la revuo kolektu aron de bonaj "raportistoj" por kovri la diversajn kongresojn, konferencojn kaj renkontiĝojn? Tiel ankaŭ la ekstereŭropaj landoj povus reprezentiĝi pli ofte kaj konsekvenca...

* * * * *

Okdek jaroj — unu longa homa vivo, kaj eĉ sufiĉe granda parto de la tuta historio de nia movado. Sed revuoj, malkiel homoj, kapablas rejuniĝi, adaptiĝi, kreski laŭ la bezonoj de la mondo kaj la legantoj. Ankaŭ nia revuo faris kaj faros tion. Kion vi atendas de ĝi en — ni diru — la venontaj du jaroj, dum ĝi proksimiĝas al sia mila numero? Leteroj estas bonvenaj!

Mark Fettes

Distraj horoj en la kancerklinika atendejo

*Jen tutfreŝaj la gazetoj
El la Esperanta Lando,
Kun konsiloj de profetoj
Pri moderna propagando,
Kun raportoj vere-veraj
Aŭ... duone fantaziaj,
Kun promesoj belesperaj,
Kun sukcesoj sensaciaj!*

(Raymond Schwartz)

Ne timu! Mi ne intencas paroli ĉi tie pri la pli ol ducent gazetoj de nia "Esperanta Lando". Unue, ĉar mi (eble) ne ĉiujn legis, due, ĉar la redaktoro draste limigas min, kaj trie, ĉar mi jam havas sufiĉe da malamikoj!

Tute hazarde, mi ekas per *Esperanto*. 80-jara ĉi tiun monaton [red.: nu, fakte, 82 veraj jaroj, sed du iel malaperis survoje...]. Tio ne reunigas nin. Nur *Espero Katolika* (1903) cinike ridetas!



1905, M.P. Berthelot estis 24-jara. 1987, Mark Fettes 25. Kiu diris, ke maljunuloj svarmas en Esperanto? (tiuj, kiuj nenion komprenas pri supraj aludoj, legu la "organigramon" ĉe la interna kovrilo. Kiuj daŭre ne komprenas, reŝaltu televidilon...) Cetere, Simo Milojević, Geoffrey Sutton aŭ Osmo Buller ne aspektis kiel emeritoj...

Esperanto estas la oficiala organo de UEA. UEA estas neŭtrala. Konsekvence ankaŭ *Esperanto*. Mi ne scias, ĉu vi iam provis verki ion "neŭtralan", aŭ ĉu vi provis "neŭtrale" interveni en diskuto? Kredu min (S-ino kaj la aliaj), jen tasko malfacila. Kaj ĉiunmonate la redaktoro devas atenti pri tiu neŭtraleco — kompatindulo! Tamen, kaj laŭ la opinio de plejmulto, la gazeto sukcesas (ne ĉiam, ni ne revu!) esti varia, informa, kaptoplena, literatura (hm! ĉu literaturo estas neŭtrala?), lingvistika, ktp-a. Nur por la lastaj monatoj, mi citu: "Kubo havas amasan E-omovadon", "La misteroj de la ĉina skribo", "Veti pri E-o", "E-o kaj la angla: ĉu konkurantoj?", ĉiuj relegindaj artikoloj. Tio ne malhelpas, ke legantoj kelkfoje grumblas (vd. "Nepermeseblaj eldiroj" en febr. 86), ĉar "neŭtraleco" ne havas saman difinon en iliaj vortaroj... Ankaŭ nemalhaveblaj estas la rubrikoj "Laste aperis", "Loke-Fake-Persone" kaj

"Recenzoj", kvankam pri tiuj lastaj, mi preferus pli da — malpli longaj, kompreneble.

Sed ja sufiĉas, neniuj petis min fari apologion de tiu revuo. Kio pri la aliaj? (Redaktoroj ĉiulandaj ekstremu!)

● ne estas ĉinaj ideogramoj, sed montras la facilecon de artikoloj en *Kontakto*. Ĉu tio estas bona ideo? (●) Ĉu estas tio ideo bona? () Ĉu bona tio estas ideo? () Bona tio ĉu ideo 'stas? (). Vi eble jam flaris, ke mi ne tre aprezas tiun sistemon... Nu, pli ĝuste, mi preferus iun "normalan" *Kontakto*-n por junuloj kaj ian "Antaŭ-Kontakto"-n por komencantoj, ĉu junaj aŭ ne. Tamen, mi ne povas ne laŭdi la laboron de Dario Besseghini kaj nuntempe de Leif Gunnar Nordenstorm (antaŭ 1979, konsultu viajn arĥivojn), kiuj "en" sed ne "pri" E-o traktis(as) multajn plej gravajn temojn de nia hodiaŭa mondo.



Ĉu vi volas ekscii pri astronomio kaj medicino, lingva situacio de U.N.-o kaj... pri inaŭguro de sakstrato "Zaza" meze de Liĥtenŝtejno? Ĉu vi volas legi la novjaran mesaĝon de H. Tonkin, frandi poeziaĵojn kaj ekscii pri... fantoma Internacia Asocio de Karotbredistoj, kiu oficiale rekomendas E-on? Tuj abonu *Heroldo*-n...

Monato estas sendube nia nura magazino. Almenaŭ tial Stefan Maul meritas gratulojn. Apud la informoj, devige ne tre freŝaj por ulo, kiu legas ĵurnalon, rigardas televidon kaj aŭskultas radion, troviĝas noveloj, poemoj, paĝoj por infanoj, kuirreceptoj por (Anna Brennan via fantomo hantas min!)... ĉiuj, krucvortenigoj. La leteroj al *Monato* bonege reliefigas la sektismon de niaj karaj "samideanoj"! Saman sektismon ni cetere retrovas en la leteroj al *Dia Regno* — la plej bona religia gazeto — aŭ al *Sennaciulo*. Tie "puraj" kristanoj insultas samseksemulojn, tie ĉi "puraj" SAT-anoj insultas dikredantojn. Kiu diris, ke E-o ne estas vivanta lingvo? Hazarde mi parolis pri *Dia Regno* kaj *Sennaciulo*: ĉu vi rimarkis, ke tiuj du gazetoj laŭaspekte tute similas?... Ankaŭ hazarde, mi paro-



lis pri samseksemuloj. Do, jen konsilo: gajaj gejoj nepre legu *Geja emancipiĝo*-n — neprestiga, satira, kuraĝa; la aliaj legu *Forum*-n....

Kiu ne legis tiun feĉverkon, ne, ŝerc, ne, ĉerk, be! elturniĝu mem, *Hamburgo en Retrospektivo*, povas aboni *Horizonto*-n kaŭ (tamen pli mallonga ol: kaj/aŭ, ĉu ne?) *La Gazeto*-n. En ĉiu n-ro vi ekscios, ke pli ruĝaj ol verdaj ni ĉiuj estas, ekde "la Hamburgaj Eventoj en 1974a, kiam sovetsociismaj landasocioj kaperis UEA-n" (*La Gazeto*, jan. 87, n-ro 8, p.13). Krom tio — for maniĝismo! — interesajn artikolojn, kulturajn, "politikajn", distrajn, vi trovos en tiuj du frataj gazetoj.

Kiu revuo "proponas internacian forumon al la esperanta inteligencio" (tiel!)? Havas 6-membran "grafika stabo"-n? multe cerbumas pri "surmerkato" kaj Manifeste Raŭmas? Ja, *Literatura Foiro*, kiu ĵus festis sian 100-an n-ran (gratulojn!). Kultura revuo? certe. Sed kial do la respondeculoj de L.F. ne adoptas tiun frazon de fama franca verkisto kaj politikisto: "La kulturo, jen kio restas, kiam oni ĉion forĝesis"?

Tiun moton ne bezonas adopti *Fonto*, monata beletra revuo. Ĉi tie, oni ne parolas pri inteligencio aŭ alia tiaĵo. Oni eĉ sin demandas ĉu William Auld havas politikon redaktadan! Ba! Dank' al tiu pek(et)o, foje minoraj poetoj povas ŝvebi super siajn kolegojn kaj revii pri onta famo! Kial ne!

Ĉu ignori la multnombrajn naciajn gazetojn? Certe ne. Apud la nepraj kaj ofte gurdaj informoj, legindaĵoj svarm(et)as.

- *Brita E-isto* kun W. Auld, kiu tie ĉefredaktas, Don Lord, A. Diaz, K. Long, R. de Jong, N.T.R. Salvesen, Daphne Lister k.a., certe revigas multajn revuojn, eĉ internaciajn!


- Aldo de' Giorgi, alia poeto, redaktis *L'Esperanto*-n (Italio) dum jaroj. Norberto Saletti, i.a. kanzonisto, reprenis la torĉon.

- Hervé Gonin, valora tradukisto, prizorgas *Franca Esperantisto*-n

- Edwin de Kock, poeto, redaktas nun *Bona Espero*-n (Sud-Afriko), kaj mi bone esperas, ke ne plu aperos strangaj asertoj pri nigruloj...

- A. Goodheir, ja poeto! redaktas *E-o en Skotlando*-n.

- Kial ne citi *Andaj Ondo*-jn el Kolombio, simpla



faldita folio, bele presita kaj sprite redaktita.

- Kaj *Norvega E-isto*, kiu ne hezitas repreni fantaziaĵojn el *La Kancerkliniko*!

- *La Espero* (Svedio), kie la Ranetoj daŭre kvakas...

- *E-isto Slovaka*, grandformata kaj ne sen interesa.

- Kaj ankaŭ *Der Esperantist*, kiun vi facile legos per lupeo...

Multajn aliajn mi povus citi, ĝis la lasta, kiun mi trovis: *Nia Tamtamo* el Zairio, sed loko, loko...

El *PopolaĈinio* kaj *Hungara Vivo* meritas apartan lokon. For la bultenoj, jen dignaj revuoj. Ja, oficiala mono helpas. Vi estas malgaja? Malfermu iun ajn n-ran de "EPĈ"; ĉu ili laboras en kotonkampoj aŭ en fabriko, ĉu ili balotadas, ĉu ili instruas aŭ lernas, ĉiam ridetas la homoj sur la paĝoj de tiu revuo. Ĉu vi volas scii, kiel rekudri ŝiritajn fingrojn, kiel mem kuraci vin, kiel la flugpilka virina teamo gajnis la lastan tutmondan ĉampionecon? (kiel eksflugpilkisto, mi publike gratulas EPĈ-n pro tiuj artikoloj!) legu EPĈ-n. Aĥ! ne malhavebla gazeto, tra kiu jam de pli ol 30 jaroj oni povas sekvi la evoluon de tiu giganta popolo. Se la gazeto sukcesis travivi la nigran epokon de la "kvarpersona bando", ni ne dubu, ke ĝi daŭre florados tra la venontaj helaj jaroj. (Ĉu ne bele?).

Hungara Vivo trovis sufiĉe taŭgan ekvilibron inter enlanda informado kaj literaturo, 2/3 resp. 1/3. Bedaŭrinde, mi ne plu ricevas ĝin kaj do, be, fu!

Ankaŭ abundas fakaj revuoj.

- *Esperantista Vegetarano*, kiun oni legas trinkante glason da viskio!

- Kiuj havas komputilon en la kapo ne maltrafos *Fokuso*-n (eks *Internacia Komputado*), belaspekta kaj dika revuo, en kiu mi tamen komprenas la desegnojn, eldonita en Hungario.

- Eble la samaj uloj legos *Scienca Mondo*-n, *Homo kaj Kosmo*-n, *Matematiko Translimen*, ktp.

EL POPOLA
ĈINIO



● *Stomatologia Forumo, Sano, Internacia Jura Revuo, Etnismo, Ekonomia Bulteno, La Filologo* ktp (ek-)kompletigas la liston de sciencaj revuoj...

La politikaj malsvarmas. *Paco* (sed kia paco?), *Internaciisto* (same!) *La liberecana ligilo* (magra!), *Sennaciulo* (kiu ja bezonus senpulvorigi sin!), *La Kancerkliniko* (sed ne nur!), *Laŭte*, *SAT-bulteno*, kiu de dek jaroj vivas sufiĉe for de eksmodaj dogmoj. [Red: Kaj ni ne malmenciu Aveno-n, ju-na kaj verd(ul)a, kies rikoltoj tamen aperas iom mal-regule...]



Espero Katolika, Dia Regno, Budhana Kuriero, Kvakera E-isto, Oomoto, Biblia Revuo ktp daŭre preĝas por la ripozo de nia animo. Dankon.

Instruistoj, inistinoj, filatelistoj, fervojistoj, ornitologoj, naturamikoj, muzikistoj ktp eldonas bultenojn.

"Lastaj, sed ne (ĉiam) la plej malgravaj" (dankon Bertram Potts), la regionaj kaj eĉ urbaj bultenoj, el kiuj *Budapeŝta Informilo* estas la plej konata.

Tutcerte mi ne parolis pri multaj. Eĉ mi ne trovis lokon por prezenti al vi *La Kancerkliniko*-n, sed ĉu vere tio gravas? Opiniojn mi esprimis, kiel okazas en libera gazeto. Lando sen multifaceta gazetaro ne estas demokratio. Tiuflanke Esperantio bone fartas ĉe la sojlo de sia dua jarcento. Kaj mi lasos la konkludon al Raymond Schwartz:



*Tamen ĉiuj tre ĝentilaj
Kaj entuziasmo plenaj;
Ĉu sciencaj, ĉu babilaj,
Estu ĉiuj do bonvenaj!*

Ĵak Le Puil

Red: Kvankam Ĵak tro modestas por reklami sian propran gazeton, "LKK" certe meritis alineon kiel la sola satira revuo en Esperantujo — kaj ĝia pli-ol-dekjara ekzisto pruvas, ke eĉ esperantistoj scipovas (foje) ridi pri si mem! Celo subteninda — kaj cetere, kiel siaj nacilingvaj kuzoj, LKK sukcesas aperigi valorajn seriozaĵojn de temp' al tempo. Se foje la redakta stilo tiel enigmas, ke oni emus forpreni "in" el la titolo... aŭ se, kvazaŭ kompanse, tiu "in"-o reaperas malvestite sur ĉiu paĝo kaj pensigas pri titolo, kie mankas "n" kaj "er"... nu, tiaj kuriozaĵoj donas al LKK ĝian apartan guston...

LA KANCERKLINIKO



ESPERANTO EN RADIO


Ĝuu sennuban eteron!

Eksciinte pri venonta "gazeta" numero, Andrzej Pettyn — ĉefredaktoro de la Esperanto-sekcio de Radio Polonia — forte instigis nin al inkludo de la "onda" gazetaro. Jen la rezulto — tra la okuloj de fervora radio-amatoro kies aŭskultado jam transis la tutan periodon de nia grafikaĵo dekstre...

Post pli ol 60 jaroj da Esperanto-elsendoj en la radio, jam devus esti klare al la lasta dubanto, ke sen ĉiutaga aŭskultado de Esperanto-programoj plej diversaj, oni ne povas esti kompetenta esperantisto. Por lerni plej bone internacian elparolon, komun- kaj faklingvajn esprimojn oni nepre jam komencu en la stadio de studado, eĉ se oni ankoraŭ ne ĉion komprenas. Alimaniere oni ne povas konkurenci kun la studantoj de aliaj lingvoj, kiuj ja nepre tion devas fari dum pluraj horoj ĉiutage pro la pli grandaj malfacilaĵoj de la etnaj lingvoj.

Kaj ne temas nur pri lingvo-lernado. Same kiel oni ne legu nur gazetojn, kiuj parolas pri movadaj temoj, oni ankaŭ ne elektu el la Esperanto-elsendoj nur tiajn partojn (kvankam ilin oni nepre aŭskultu por akiri plej freŝajn sciojn). La organizoj, kiuj disponigas siajn elsendojn en Esperanto, ja ne faras tion simple por plaĉi al la esperantistoj, sed unuavice por informi pri politiko, kulturo, socia vivo en la koncerna lando aŭ medio.

Kompreneble vi eble diros: Mi ne havas la tempon aŭskulti ĉiutage — provu tiam semajnfine — aŭ, mi povas aŭskulti nur per mezaj ondoj. Tiukaze tamen, dum unu semajno vi havas 17 bone aŭdeblajn elsendojn: 14 per frekvenco 1503 kHz de Radio Polonia, du de Vatikano dimanĉe per 1530 kHz kaj ĵaŭde per 1611 kHz, kaj unu de Zagrebo per tri samtempaj frekvencoj 1125, 1134, 1143 kHz — el kiuj 1134 kHz kun superforto de 1200 KW ĝojigos vin pro la klareco. Kompreneble tiuj mezondaj elsendoj estas aŭdeblaj nur en Eŭropo kaj Nordafriko. Mallongondaj elsendoj de Radio Polonia, kvankam nur direktataj al Eŭropo, tamen havas aŭskultantojn eĉ en Sudameriko, Aŭstralio kaj Japanio. Petu ĉiukaze programkajeron de ĉiu stacio! El tiuj, Radio Vatikana havas la plej luksan, kaj kune kun Radio Romo ankaŭ la plej oftan. Por Svisa Radio Internacia la programkajero estas necesega por ekstereŭropaj aŭskultantoj kaj por tiuj en Eŭropo, kiuj maltrafas la poreŭropajn elsendojn kaj intencas kapti ilin per la ripetoj por aliaj mondopartoj. Vi povus akompani la peton al SRI per gratulo por la 40ajara jubileo!



Evoluo de Esperantaj radio-elsendoj de 1945 ĝis nun. Ni dankas al Georges Larglantier, prizorganto de niaj radio-rubrikoj dum jardekoj, pro ĉi tiu okulkapta prezento de sekaj ciferoj. Li skribas: "La malkresko en la jaroj 1952-53 estis kaŭzita de la ĉeso de ĉiuj programoj ĉe la stacioj en socialismaj landoj. Poste venis Pekino kaj Varsovio... Notinde estas, ke preskaŭ ĉiuj elsendoj estas nun aŭdeblaj longdistance, dum en la jaroj 1950-60 multaj venis el malfortaj stacioj... La progreso do estas rimarkinda!"

Dum la lasta tempo por havi materialon por prezenti al vi, mi ne nur aŭskultis, sed ankaŭ notis aŭ surbendigis kelkajn partojn. Mi faris tion unue por la tuta semajno, poste por ĉi tiu semajnfino. Mi troviĝas en dilemo, ĉar elsendoj tiel abundas, ke mia materialo estas tro riĉa por eĉ nur mencii la plej gravajn detalojn — horo, frekvenco, aparato per kiu mi kaptis, anteno, ĉefa enhavo, miaj rimarkoj.

Mi do simple rakontu:

Ne nur plej grandan lingvan profiton oni havas el la elsendoj de **Radio Polonia**, sed ankaŭ plej grandan enhavan. Dum la Jubilea Jaro oni faras ekstremajn streĉojn por raporti pri koncernaj aranĝoj: ekz. pri la aktuala IFEF-kongreso rekte el Katowice, pri la preparlaboroj por la UK, kiuj pro la konataj malfacilaĵoj nur malfrue povis ekmoviĝi, pri laŭ prezento tre simpatia Alta Protektanto, ankaŭ bjalistokano, pri raportoj de la aŭskultantoj pri jubileaj aranĝoj, kompreneble ankaŭ pri politiko, kulturo, literaturo ktp. Ĝuu la programojn sesfoje tage!

Svisa Radio Internacia havas tri diversspecajn elsendojn. Lunde prezentiĝas svisa temo fare de d-ro Athur Baur; ĵaŭde s-ro Claude Gacond en la lasta tempo gvidas Jubilean Esperanto-Forumon, pri la loko kiun Esperanto okupas en la vivo de Esperanto-aktivuloj; kaj s-ro Andy Künzli lastatempe en la sabata elsendo faris prelegserion pri slavaj popoloj, lingvoj kaj literaturaĵoj kaj plejlaste laŭtlegis partojn el "Sub la jugo" de Ivan Vazov. La sabata elsendo estas bedaŭrinde ne mondvaste ripetata, sed tre interesa.

Romo en la sabatovespera elsendo de la 16a de majo prezentis mozaikon de interesaj eventoj, ekz. pri opero Aida en la egipta dezerto akompanita de aviadilaj akrobataĵoj, pri plej facila vivo en Svislando kaj plej malfacila en Mozambiko ktp. Instruiriĉa elsendo.

Radio Vieno, prezentante unue la semajnan komentarion, parolis pri la nuntempe plej tikla problemo de la aŭstria politiko, raportis pri nutraĵaj plantoj ankoraŭ malmulte uzataj, dankis al ĉiuj alskribintoj kaj citis el ties leteroj. La dimanĉmatena elsendo estas por mi ĉiam ĉarma renkontiĝo kun d-ro Beckmann, s-ro Emil Vokal, s-ro Walter Haberl k.a.

Radio Pekino en la dimanĉa elsendo (17 majo) devis kun bedaŭro jam raporti pri 191 mortintoj en la arbara incendio en Norda Ĉinio, poste konigis la fakton ke 1988 estas la jaro de la drako, por kiu ekzistas 140 folkloraĵoj festoj, parolis pri poŝtmarkoj kaj pri la blankaj gruoj, kiuj estas simbolo de longviveco. La leterkesto ĉiam prilumas petitan temon — ĉi-foje pri urbaj floroj kaj arboj en Pekino.

Radio Vatikano en la dimanĉvespera programo prezentis unu parton el la evangelio de Johano, parolis pri katolikoj en Etiopio, prezentis diversajn aktivecojn de la Papo, raportis pri persekutoj en Sudafriko, pri malobservo de homaj rajtoj en Brazilo, pri ekumena kongreso en Bari pri ikonoj, pri kurso pri kristanismo en turka universitato ktp. Ĉe la fino oni ankoraŭ anoncas specialan Esperanto-programon en la kadro de la latina meso.

La dimanĉan vesperon finas ĉiam la elsendo de niaj kroataj geamikoj el **Zagrebo**: kunveno en Lima solo pri konferenco de reprezentantoj de nealianciataj landoj, raportoj pri Botsvano, ekonomia kunlaboro kun Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio, komerco kun Hungario ktp. Aldoniĝis recenzo pri Esperantolibroj kaj raporto pri ĉina art-ekspozicio...

Jen do bunta rikolto! Elektu mem el la horaro, kaj elprovu. Se la aktivadoj dum la Jubilea Jaro almenaŭ iniciatu iradon sur vojo al la fina venko, tiu Esperanto en la radio (kaj sekve en aliaj amas-komunikiloj) devus ludi pli grandan rolon.

Günther Becker

Rekorda sveda kongreso

Ankaŭ Sveda Esperanto-Federacio sukcesis havigi al si Parlamentan Doman por sia kongreso en la Jubilea Jaro: tiel ni sukcesis konkuri kun la hungaroj! En Stokholmo dum tri aprilaj tagoj ne nur la inaŭguro sed ankaŭ la tuta jarkunveno kaj pluraj aliaj aranĝoj okazis en la Parlamenta Domo. Ne estas surprize, ke tiaj dignaj cirkonstancoj allogis tiom da partoprenantoj, 260, ke estis rekordo en la historio de la svedaj kongresoj.

La UEA-prezidanto Humphrey Tonkin estis gasto kaj faris — laŭ ĉiuj opinioj — brilan festparoladon pri la estonteco de la Esperanto-movado. La brita lingvisto John Wells estis alia elokventa gasto.

La planoj antaŭvidis, ke la prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, estos la inaŭgura parolanto. Bedaŭrinde li kelkajn tagojn antaŭ la kongreso malsaniĝis. Anstataŭanto estis alia tre konata parlamentano, Daniel Tarschys. Li surprizis la kongresanojn parolante libere en flua Esperanto post sia perfekta legado de la parolado de Ingemund Bengtsson. (Montriĝis, ke li lernis la lingvon kiel 12-jarulo kaj ankoraŭ scipovas ĝin.) Ankaŭ la eksepiskopo de Stokholmo, Lars Carlzon, partoprenis la kongreson, parolante parte en Esperanto.

Precipe antaŭ la kongreso estis amaso da informoj pri Esperanto en svedaj gazetoj kaj radio. Grandan intereson altiris ankaŭ filatela ekspozicio pri Esperanto en la Poŝta Muzeo, aranĝita de Anna Greta Strönne.

Börje Andersson

En la aprila numero ni jam informis pri planoj de la Estraro plivastigi la agadon de UEA en Azio, surbaze de grandioza donaco de japana esperantisto. Jen nun plia paŝo al tiu celo:

Azia Konferenco de UEA 28-29 augusto 1987 Tokio, Japanio

La programo ampleksos fundan diskutadon pri la fortoj kaj bezonoj de la azia Movado.

Informoj ĉe Yosimi Umeda (vicprezidanto de UEA), Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tokyo 153, Japanio — tel (03) 770-6486 — telekso 02655177 sk eki j.



IFEF-prezidanto Joachim Giessner parolas en la malfermo.

Fervojistoj unuaj en Pollando

Pli ol kvarcent esperantistoj el 18 landoj partoprenis la 39an kongreson de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) en Katowice, tiel inaŭgurante la jubileajn kongresojn en Pollando. De la 16a ĝis la 22a de majo efektiviĝis fakaj prelegoj, raportoj kaj diskutoj, ekskursoj k.s. en la "fervoja ĉefurbo" de Silezio, apud ampleksa distra programo. Interalie, la reelektita gvidanto de la Terminara Komisiono Gernot Ritterspach povis triumfe montri (kaj disdoni) la literojn A ĝis D de eldonota granda Fervoja Terminaro, kies finpretigon klopodas solvi Dieter Hartig, redaktoro de *Terminara Kuriero*.

Franca E-muzeo inaŭgurita

Pli ol cent esperantistoj — francaj, luksemburgaj kaj germanaj — ĉeestis la oficialan inaŭguron de la Nacia Esperanto-Muzeo en Gray, Francio. Prezidis la ceremonion la pola konsulo kaj la urbestro de Gray, kaj salutis perletere la franca ministro pri kulturo, F. Léotard. La regiona Esperanta Kultura Centro sendis 500 presitajn invitilojn kun informfolio pri Esperanto al lokaj muzeo-direktoroj, prezidantoj de turismaj oficejoj, politikaj reprezentantoj kaj urbestroj ktp. Sekve multaj eminentuloj partoprenis la malfermon, kaj favore raportis regionaj gazetoj, radio- kaj televid-stacioj.

La muzeo servos kiel dokumentejo, arĥivejo kaj konstanta ekspoziciejo, en impona dek-ĉambra spaco de 230 kvadrataj metroj. Dank' al sia fondinto s-ro G. Junier, ĝi jam enhavas libron kaj multajn valorajn dokumentojn. Informoj kaj materialoj pri la Muzeo haveblas de Centre Culturel Espéranto, 19 str. Victor Hugo, F-70100 Gray, Francio.

"Universala tradukreto": ĉu realigebla iniciato?

Jen raporto pri projekto jam foje menciita en niaj paĝoj. Sub la teksto vi trovos kelkajn komentojn de la redaktoro.

La tradukreto estis fondita por profiti eksterordinaran forton nian, nome la ekziston en ĉiuj landoj de membroj parolantaj lingvon universalan, kaj sekve la kapablon krei nekonkurenceblan tradukreton ĉiucelan, pri industrio, komerco, turismo, reklamado kaj kompreneble literaturo. Ĉiu el ni povas imagi kiel rapida estus la ekuzo de Esperanto en tiuj aktivaj medioj, se nur kvin procentoj de la esperantistoj kunlaborus. Staras tamen grava malhelpo, tute komparebla al la kaŭzo de la malrapida disvastiĝo de Esperanto: dubo, malfido al novaĵo eĉ ĉe la esperantistoj mem. La teknikaj obstakloj — kvankam gravaj — estas pli facile venkeblaj ol tiu sinteno.

Nia situacio estas nun jena: jam organiziĝis en kvar landoj kernoj de asocioj, kaj el la tuta mondo, ĉu spontane kaj entuziasme, ĉu iom scivoleme aŭ eĉ dubeme, proponis sin pli ol cent esperantistoj, inter kiuj spertaj lingvistoj kaj profesiaj tradukistoj. Ekfunkciado de la organizo estis origine antaŭvidata pere de landaj asocioj kun propraj statutoj, adaptitaj al la landaj leĝoj, se eble registritaj kiel edukemaj asocioj por ricevi oficialojn monhelpojn. Ta-

men, ĝis nun nia penetriĝo en la oficialajn instancojn ne estis sukcesa, la volontuloj "atendas", kaj ni ne plu progresas.

La solvo pure komerca, krei tradukfirmaon kun ĉiulandaj filioj, montriĝas finfine la plej realisma, kvankam solvo bazita sur la profito ne harmonias kun nia idealo. Pro tio, venis la momento transpaŝi nian "ĉastecon". Traduklaboro estas laboro, kaj ĉie en la mondo oni pagas la laboron. Ni tute kapablas produkti tradukadon je tre favora prezo, kiel? — ĉar la plimulto el ni pretas labori senpage.

Mi eventuale povus krei la firmaon, sed pro jam tro granda laborŝarĝo, mi ne povus ĝin funkciigi. Ĝi prefere naskiĝu en granda urbo kie troviĝas helpantoj. Aktivaj kluboj estas petataj.

Nun mi faru demandojn al la dubemuloj.

- Ĉu la "kruela" manko de akcepteblaj tradukantoj estas facile solvebla en la venontaj jaroj?
- Ĉu la mono necesa por la presigo de centoj da diversaj teknikaj vortaroj aperos? De kie?
- Ĉu la problemon de niaj lingvaj mankoj ni solvu nun, aŭ nur atendu la devigon de la ĉiutaga uzado?
- Ĉu vi havas solvon por teni la centojn aŭ milojn da simpatiantoj kiuj ĉiujare eklernas kaj... forgesas Esperanton pro manko de motivoj, ĉefe de internacia uzado?

Karaj geamikoj, mi atendas viajn reagojn, favorajn aŭ ne.

C. Bodson

Montigny-en-Cis, F-59225 Clary, Francio.

Red.: Jen jam unu reago! Mi rekonas en ĉi tiu iniciato kelkajn trajtojn tre disvastigitajn en Esperantujo, kaj mi pensas ke estas bona okazo, iom esplori ilin en niaj paĝoj. Mi listigos kelkajn laŭ mi tipajn, ne en spirito de mokemo, sed cele al pozitiva evoluigo de tiu ĉi kaj aliaj ideoj.

● **Ambicio.** La projekto celas kvazaŭ konkeri la tutan mondon, efektivigi la finan venkon de Esperanto, aŭ simile. Laŭ mi, kiel ajn mondvasta estas la Movado (kaj ĝi cetero havas iujn geografiajn limojn), ĝi ne havas pli ol principan "eksterordinaran forton". Oni bezonas realisman takson pri la esperantistaro antaŭ ol proponi realigeblajn ideojn.

● **Monpudoro.** Ekster Esperantujo (kaj kelkaj aliaj samspecaj movadoj), ellaborita financa bazo estas unu el la unuaj postuloj al praktika projekto. Estas ne mirige, ke multaj aliflanke valoraj iniciatoj fiaskas, se oni kredas ke "la profito ne harmonias kun nia idealo". Pretere dirite, en mia opinio la financa bazo de UEA, apoganta sin precipe sur donacoj kaj membrokotizoj, estas absurde "movadeca"...

● **Izoliteco.** Traduklaboro ja postulas fakajn vortojn, sed oni diras nenion pri la esperantistaj terminologoj. Pro manko de antaŭa esplorado kaj informiteco pri tio, kio okazas aliloke en Esperantujo, iniciatemuloj ofte klopodas re-inventi la radon por konstrui aŭtomobilon.

● **Struktura nebuleco.** Iniciatanto ofte pretas nur iniciati: t.e. lanĉas ideon, altiras iom da intereso, kaj tiam atendas ke iu altirito prenu sur sin la estontan organizan agadon. Nu, estas bone se tia altirito ekzistas, sed dependi de tio estas tre malfirma bazo por projekto. Jen eble unu kialo por ofta skeptikeco inter esperantistoj. Krome, la organizaj problemoj rilate internacian agadon ne estas bagatelaj aŭ facile solveblaj: same kiel la financa bazo, ili meritas tre fruan kaj fundan atenton.

Ne malofte la iniciatantoj esperas solvi siajn problemojn per transdono de ili al UEA, kio en la praktiko signifas al la Centra Oficejo. Ĉi tie, kie ni ofte sentas nin tro malmultaj por eĉ la nuna taskaro, tiaj petoj trovas tujan lokon — en arĥivo.

● **Entuziasmo kaj ideoriĉeco.** La supraj mankoj ne signifas, ke tiu ĉi iniciato aŭ multaj aliaj estas malbonaj. Male, ili havas unu universalan forton: la entuziamon de la iniciatantoj. Estas despli granda perdo, se tiu entuziasmo disfrakasas sin per manko de kunjungita realismo.

Nu, s-ro Bodson petas ankaŭ viajn reagojn al lia iniciato. Ilin vi sendu rekte al li (eble kopie al ni); sed koncerne la revuon mi aldonas inviton al pliaj ĝeneraltemaj reagoj pri tiu tuta problemaro kiu ligiĝas kun la ideo de "amatoreco", kaj inkube sidas ne nur sur ni sed sur aliaj idealismaj movadoj.

Tra densa polvnubo briletas la celo...


Kiel projekton por mia sabata jaro kaj duonjara foresto de mia posteno ĉe la universitato Denison en Ohio, Usono, mi entreprenis esploron de la ĉefaj Esperantaj bibliotekoj. Inspiris min grandparte la verkoj de la mortinta jugoslava esperantologo Marinko Ĝivoje. Do kiel mia kontribuo al la jubileo de Esperanto, mi min proponis kiel volontulon en Roterdamo por prizorgi la bibliotekon Hector Hodler en la Centra Oficejo.

Ĉar UEA neniam dungis profesian bibliotekiston, kaj la tro-ŝarĝitaj oficistoj ne povis ofte dediĉi sin al la bibliotekaj taskoj, mi trovis iom ĥaosan situacion. Ĉirkaŭ la belaj mebloj, la kliniĝintaj malnovaj libroj kun degeneranta papero kaj sufiĉe da polvo plenŝtopis la bretojn. Multaj troviĝis en ŝrankoj aŭ kaŝiĝis en diverslokaj skatoloj; pluraj skatoloj eĉ suferis akvodamaĝon antaŭ kelkaj jaroj pro frostigitaj akvotuboj kaj duŝeja inundo en la supera etaĝo. Ekzistas neniuj laŭtema katalogo, kaj aŭtora-titola nur ĝis 1978. Pli ol unufoje mi kriis: "Ĉi tio ne estas biblioteko, ĝi estas libraraĉo!"

Tamen la laborado inter la 12 949 volumoj (jes, mi kalkulis ilin!) ebligis al mi trovi multajn literaturajn trezorojn; kaj la ne-ortodoksa bret-sistemo (laŭ jaro de eldono) ebligis la kompilon de interesa statistikaro. Kompreneble, ni ne havas ĉiujn librojn en aŭ pri Esperanto, kaj nia kolekto enhavas ankaŭ librojn pri Volapük, Ido ktp., sed la jaraj nombroj tamen donas pli-malpli fidelan reflektan de la amplekso de Esperanta eldonado tra la jaroj. Ĉu vi sciis, ekzemple, ke la eldonkvanton de 1908 oni superis nur en 1982? La libroj okupas 87 metrojn da bretoj, do la averaĝa dikeco estas 0,67 cm, de magraj broŝuroj ĝis pezaj volumegoj.

Ni faras paŝojn kaj planojn por modernigo de la kolekto per komputila sistemo, ne nur por plifaciligi konsultadon de niaj trezoroj en la biblioteko mem, sed ankaŭ por la celo de estonta universala katalogo de la Internacia Lingvo. Mi esperas, ke ni povos fari pluajn raportojn pri nia progreso.

Roĝero Blaine



NOVAJ PROJEKTOJ DE EDUKA FONDAĴO „CARSON”

Ĉe la printempa kunveno de la kuratoroj de la Eduka Fondaĵo "Carson", pli ol CDN\$13 000 estis destinitaj por subvencii la jenajn projektojn:

- Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj por eldoni informilon pri ILEI kun detala priskribo de la agadprogramo
- Grupo Esperanto de Valencia por ebligi la eldonon de hispanlingva lernolibro
- Amri Wandel (Usono) por ebligi la eldonon de infanlibro
- Gao Wei (Ĉinio) por ebligi kursojn en Xian
- Wang Xigen (Ĉinio) por ebligi kurson por infanoj kaj la eldonon de taŭgaj lernolibroj
- Dorothy Hawley (Kanado) por subvencii la eldonon de terminaroj por la vintraj olimpikaj ludoj en Calgary (1988)
- M.H. Saheb-Zamani (Irano) por la sendkosto de libraro el Finnlando
- Argentina Esperanto-Lernejo por stipendioj kiuj ebligas la partoprenon de 100 lernontoj ĉe la perpoŝta kurso en Rosario
- H. Bakker (UEA) por ebligi la partoprenon de inda homo el Afriko ĉe kunsidoj en Eŭropo

La Eduka Fondaĵo "Carson" bonvenigas proponojn kaj petojn por indaj edukaj projektoj. Bonvolu skribi por formularo al la Eduka Fondaĵo "Carson", 1339 Hamilton St. N.W., Calgary, Alberta, Canada T2N 3W8. Limdatoj por ricevi formularojn estas 1 aprilo kaj 1 septembro jare.

Anne Whittaker

Urala florperiodo

En la decembra numero pasintjare aperis "Loke" - ero pri la Komuna Esperanta Biblioteko en Sverdlovsk, Sovetunio, kiu menciis ties rolon kiel kultura centro por la urala esperantistaro. Intertempe du ĉefgvidantoj de la biblioteko, Halina Gorecka (direktorino) kaj Aleksander Korĵenkov (redaktoro de la kultura revuo *Sezonoj*) fariĝis delegitoj de UEA, kaj skribis iom pli detale al ni pri KEB (enkadra teksto sur p. 112).

Jam delonge oni aŭdis pri relative granda Esperanto-movado en Sovetunio (vd. ekz. *Esperanto* 1979/p.81-84 kaj 1983/p.5), sed post la decido de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj retiri sian aliĝpeton al UEA en 1984, tiaj novaĵoj fariĝis bedaŭrinde maloftaj. Tamen ŝajnas, ke ili ja estas ĝustaj, ĉar la enhava kvalito de *Sezonoj*, same kiel tiu de ĝia kuzo

Literatura Skatolo, estas eĉ konsternante alta, kaj signita de trafa inteligenta kritikemo malofte renkontebla en Esperantujo. Ĉu vi kredas, ke ni troigas? Nu, jen kelkaj elĉerpaĵoj, por ke vi juĝu mem...

El *Sezonoj* 10 (aŭtuno 1986):

"La Esperanta literaturo malhavas sian Borges, kiu influus la cerbojn de la nuntempaj intelektuloj. Valano estas tro bagatela, Nemere ne montras ĝueblan stilon, Lorjak foje — jes, sed tro disipe. Tamen estas bone, ke almenaŭ ekaperas literatura vivo..." (Aleksej Birjulin, intervjuita de A. Korĵenkov)

"Ni konscias nian relativan fermitecon, izolon, neebon uzi Esperanton en internaciaj konferencoj. Tial ni fortigu per partneraj rilatoj la reputacion de Esperanto antaŭ la landaj kulturaj organizoj [per kunlaboro kun bibliotekoj, kino- kaj telestudioj, verkistoj, deklamistoj]... Ni faru ankaŭ prezentojn de la kulturaj valoroj de Esperanto al vasta ne-Esperanta publiko... Necesas ankaŭ pli atenti la ligitcon de konscia esperantistaro kun porpacaj kaj humanismaj streboj, kiuj devas trovi subtenon en




"Ho, Esperanto! Mi diru jene: antaŭ Esperanto mi donus prioritaton al nur unu afero — al la renovigado. Kiam ni finos la renovigadon, tiam ni komencos pri Esperanto..."

Jen la bonhumore ironia reago de Miĥajl Gorbaĉov al demando pri instruado de Esperanto, starigita dum li parolis kun homoj en la stratoj de Tallinn, Estonio. La okazaĵon raportis la gazeto *Moskvaj Novaĵoj* (1 marto 1987), kiu aperas en pluraj lingvoj krom la rusa. La ĵurnalisto poste komentis, ke la "renovigado" estas efektive nova lingvo inter la gvidantaro kaj la popolo. "En iu senco ĉi tiu estas la 'Esperanto' de Gorbaĉov."

Plaĉas la pozitiva tono de la komparo, sed ni kompreneble dirus al la ĝenerala sekretario, ke ankaŭ internaciaj rilatoj bezonas sian "renovigadon", en maniero ebla nur tra rekta, senpera komunikado per internacia lingvo... Ne devus temi pri "unue" kaj "poste", sed pri ambaŭ samtempe, ĉiu apoganta kaj plifortiganta la alian. Bone, do, ke iu starigis la demandon! Ĉu sekvos pliaj?

Jaroj de Esperanto-eldonado: La statistiko pri libroj posedata de la biblioteko Hector Hodler respegulas la historion de la Mo-
La katastrofa efiko de la du mondmilitoj estas aparte klare
a. Kun 38 titoloj de antaŭ 1887 kaj 297 kun nesciata dato, la
teko fine de majo enhavis 13 013 volumojn; senĉese alvenas
precipe en la jaroj 1985-87, tiel ke la lastaj du stangoj certe
eskos. La ciferoj ne inkluzivas periodaĵojn.



nia literaturo." (el prezento de la celoj de Esperanta Rondo Kulturo, la organizaĵo kiu eldonas *Sezonoj*)

El *Sezonoj* 11 (vintro 1987):

"En 'Nokt-pens-ad' Gazizi provis ŝanĝi la kutiman formon de siaj kreaĵoj, sed la enhavo restas same magra. Prezentinte la enue ordinaran bildon de viro kun am-fendo, la aŭtoro fine metas 'ardan demandon':

Ki' os mi por ŝi

se mi mort' pro l'brul?

Vi ne mortos — mi povas diri al la protagonisto, — matene vi nur vekiĝos kun kapdoloro kaj kolera pro l' ne sufiĉa dormo kuros al la ĉiutagaj aferoj..." (Aleksandr Zagvazdin, recenzante *Zigzage* de Gafur Gazizi)

"Laŭ la informoj de Unesko la kvanto de la esperantistoj atingas dek milionojn. Tio estas granda indico, sed oni ĝin ne supertaksu. Image oni povas kompari tion al giganta, situanta sur mapo videble verdeta areo kun kelkaj verdaj makuloj inklude. La evoluinta vivo ne eblas en tiuj senkoloraj dezertoj. Kaj malgraŭ iom ajn grandaj indicoj ĝi ne eblus ĝe-

nerale, se ne ekzistus tiuj verdaj makuloj de necesa intenso." (Alen Kris, "Verdaj makuloj sur verdeta fono")

Kaj el *Ekzakte*, la urala informbulteno, n-ro 6 1986:

"Post ioma paŭzo en (Toboljsk) plivigliĝis la Esperanta movado... Tamen, ĉu la kvanto de la kursoj helpas starigi en Toboljsk stabilan klubon? Mi opinias, ke ne. Ne pli ol du-tri personoj taŭgos por la estonta agado. Kiuj kapablas pri la lingvo apenaŭ helpas evoluigi la klubon, kaj kiuj taŭgas por la klubo, tiuj aŭ mallertas en la lerna proceso aŭ jam 'verdiĝis' ĝis netolerebla stato." (Aleksandr Zagvazdin, denove)

Jen, do, eta gusto de la konsisto de la urala Esperanto-komunumo en ĝia nuna florperiodo. Ni same kiel ĉiuj esperantistoj esperas, ke post nelonge la nuntempaj evoluoj en Sovetunio ebligos la revenon de la sovetiaj esperantistoj en la sinon de la internacia movado. Jen kio estus bela inaŭguro por la dua jarcento!


Mark Fettes

IOM PRI K.E.B.

Komuna Esperanta Biblioteko ricevis, aŭtune 1986, propran lokalon kun libroŝrankoj, seĝoj, labor-tablo kaj kataloga kesto. Ĝia libraro fine de januaro 1987 superis 400 volumojn kaj plu kreskas, ĉefe dank' al donacoj. Inter la lastaj kontribuintoj estas: P. Jegorovas, L. kaj V. Ditjatev, R. Sikorski, An. Gonĉarov, A. Mikiŝev, B. Kolker; ankaŭ organizoj: HEA, ER Kulturo (USSR), BEM (Bulgario), Grupo Nifo (Hispanio), Sezonoj (USSR), Lodza Universitato, LF-koop., UEA, BAJU (FR Germanio) k.m.a. La biblioteko kore dankas!

KEB kolektas originalan beletron, planlingvistikajn verkojn, librojn pri historio, kulturo kaj apliko de Esperanto, kulturajn kaj lingvistikajn periodaĵojn (Romuald Sikorski antaŭnelonge transdonis preskaŭ plenan kolekton de *Norda prismo*). Specialan atenton ĝi metas al kolektado de Esperantaj kaj interlingvistikaj libroj el Ruslando kaj Sovet-Unio. La aktuala sliparo registras 137 volumojn de tiaj.

KEB estas manifestiĝo de la kreskanta intereso al la kulturaj valoroj de la zamenhofa lingvo inter la orientsovetiaj esperantistaj intelektuloj. La biblioteko apartenas al neniun organizon, klubon aŭ instanco, sed nur al la legantoj mem, siavice — tra la senlaca direktorino Halina Gorecka — servante al ilia krea evoluo per Esperanto. Bibliografia kaj konsulta laboro, recenzado (ekzemple, KEB-anoj regule recenzas por *Hungara Vivo* kompensante la librojn de HEA senditajn al KEB), ekspozicioj, prelegoj... La agado estas varia. Sed ne ĉiam glata, ja la biblioteko ne disponas



KEB-direktorino Halina Gorecka.

internacie konverteblan valuton, nek internaciajn respondkuponojn — ĝi vivas precipe el donacoj kaj interŝanĝo, kiu ne ĉiam estas ebla.

Komence de la 20-a jarcento la biblioteko de ruslanda esperantisto Georg Davidov ricevis ekzempleron de ĉiu nova libro en/pri Esperanto. Ĉu fine de l' jarcento tiu precedento povas ripetiĝi samlande tra KEB? Ĝi atendas kunlaborajn proponojn de aliaj bibliotekoj, redakcioj, eldonejoj, libroservoj... Ja sendante libron aŭ pakon da revuoj al KEB vi helpas kulturen riĉiĝon de la tuta grupo de l' komencantaj esperantistaj poetoj, tradukantoj, literaturistoj, kiujn kunigas la Komuna Esperanta Biblioteko. La adreso de KEB: SU-620145, Sverdlovsk 145, ab. jaŝĉik 287; Sovet-Unio.

Aleksander Korĵenkov

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Respondkuponoj ne senproblemaj

Rilate la "Noto por uzantoj de la delegita reto" en la februara numero: Mi bone komprenas la situacion de la Delegito en fora Indonezio, sed mi devas diri ke miaj spertoj rilate al "respondkuponoj" montriĝis malbonaj: aŭ pluraj delegitoj ne respondis, aŭ ili loĝas en landoj, kie la sistemo ne validas. Mi do ŝanĝis la agadmanieron, demandante al miaj korespondantoj, kiel aŭ per kio mi povus rekompenci ilin. La respondoj plej ofte estas kontentigaj kaj pozitivaj, ekz.: "respondkupono ne gravas", aŭ "sendu prospektojn de via lando" ktp. Certe mi ne povas — aŭ volas — ŝanĝi la regulojn, sed ĉu ne valoras pripensi la temon por plibonigi la situacion en la estonteco?

Constant Borremans (FR Germanio)

Esperiga marta

La marta numero de *Esperanto* ja donas iom pli da espero por eventuala sukceso de la Jubilea Jaro ol iu ajn antaŭa eldono. Gratulojn al ĉiuj respondecaj por tia ŝanĝo!

W.D.B. Hackett (Kanado)

Malkontento pri »satisfakcio«

Mi supozas ke vi prikonsideras la evoluon de la lingvo Esperanto. Mi konsideras tion kiel redaktoran devon.

La evoluo de nia lingvo maltrankviligas min. Mi ne plu citos detalojn. I.a. la nenecesaj neologismoj estas plago. Despli ĉar ili estas preskaŭ senescepte prenataj el la okcidentaj angla aŭ franca lingvoj. Laŭ mi, oni devus kontraŭbatali tion. Nia tuta grupo samopiniis.

Kaj kion mi konstatas? Sur p. 46 de via marta numero mi legas la vorton "satisfakcio". Tuj mi konsultis la

P.I.V. Tie ĝi estas indikita kiel neologismo. Plie du kazoj en kiuj ĝi povas esti uzata. Nu, neniuj el tiuj du kazoj estas aplikeblaj en la frazo de tiu artikolo.

Mi opinias ke vi, kiel respondeca redaktoro ne povis allasi tiun vorton. Se Esperanto evoluus en sama direkto, tiel ke ĝi iĝus okcidenta anstataŭ tutmonda lingvo, tiam ni ne plu povus subteni ĝin. Mi ĉiam estis kontraŭ iu aŭ ia "Occidental".

F. Roose (Belgio)

Ankorau post 200 jaroj...

Kun atento kaj intereso mi legis la artikolon de s-ro Vaŭn Fraŭsin, "Post cent jaroj, for la profetaĵojn!" (*Esperanto* 1987, p.68 69), kaj lian rezonadon por montri ke la cent jaroj de nia movado povas esti argumento por kaj ne kontraŭ Esperanto. Tiurilate mi ofte uzas alian ekzemplon por pruvi ke granda aĝo per si mem ne estas argumento kontraŭ praktika elpenaĵo kiu ankoraŭ ne venkis la inertecon de la mondo: La metra sistemo datiĝas de 1790 kaj ĝia internacia uzo baziĝas sur la Internacia Konvencio pri la Metro, subskribita en Parizo en 1875. Kvankam la metra sistemo estas preskaŭ duoble pli aĝa ol Esperanto, estas pli facile lernebla ol tuta lingvo kaj eĉ kiel Esperanto — estas bona kaj racia kaj ambaŭ sendube ĉiam progresos — malgraŭ la grandegaj kostoj kiuj komence ĉiam ligiĝas al la disvastigo kaj aplikado de nova ideo, eĉ ideoj 200-kaj 100-jaraj.

Eskil Svane (Francio)

For la lamentadon!

En n-ro 976 (4) plaĉis aparte al mi la artikolo de Vaŭn Fraŭsin, "Post cent jaroj, for la profetaĵojn!", kaj el tiu ĉefe la konsiloj n-ro 5, 6, 8, 9. Se ĉiuj esperantistoj priatentus tiujn konsilojn, ni eble allogus pli da homoj ol per la lamentado ofte montrita.

Franz Braun (FR Germanio)

Temas ne nur pri lingvo, sed pri valorsistemo

En la donita formo, la tezoj de Stefan Maul (*Esperanto* 1987 p.72-73) estas nekompletaj. Koncerne la percepteblajn faktojn ili ja pravas. Sed tiu ĉi planedo elmontras multajn faktojn, kiujn oni devas percepti, tamen ne akcepti!

Ekzemple estas ja vera fakto, ke la industriigo laŭ la "normoj" de la superrega eŭropdevena scienc-teknika-ekonomia valorsistemo transprenadas la tutan mondon kaj multrilate detruas ĝin samtempe. Ni bone perceptas tion, sed ĉu ni akceptu?

Ekzistas sufiĉe da evidento, ke la disvastiĝo de la uson-angla okazis kaj okazas pro absoluta superpotenco de la materia fono en la uson-angla kulturo sfero. Kaj tiu ĉi superrega, ne-neŭtrala, diskriminacia kaj detru(em)a trajto de la apliko de la uson-angla (samkiel de ajna alia etna "mondlingvo"!) ne forviŝeblas pro la fakto de sia ekzisto!

Bone dirite: "Estas utopio atendi, ke Esperanto povus anstataŭi la uson-anglan lingvon kiel internacia lingvo". Ĉu ankaŭ utopio, ke tiu ĉi mondo iam rezignos pri detruaj principoj? Ni asertas, ke estas ankaŭ fakto la ekzisto de **valorsistemo**, kiu bone distingas inter la uson-angla lingvo mem kaj ĝuste ĉi tiu superrega politiko, kiu kun la aliaj "kulturaj" perfortoj alportas ankaŭ lingvan subpremon al la mondo.

Ni esperantistoj tial ne ridindiĝas, postulante batalon kontraŭ "lingvo-imperialismon" helpe de la Internacia Lingvo. Tio kompreneble validas nur se temas pri esperantistoj, kiuj rigardas la Internacian Lingvon kiel komunikilon, kiu ekde komence celas politikan pacon, socialan justecon kaj naturkonservadon. Fakte ja ne ekzistas iu etna lingvo, kiu laŭ la esenco de sia memkompreno akcelas tion, kio estas en la intereso de ĉiuj individuoj kaj popoloj!

Wolfgang Gunther
(Asocio de Verduloj Esperantistaj /FR Germanio)

Traduki ludile pretertrafas la celon

La suferoj de la juna Werther, Johann Wolfgang von Goethe. El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Heckendalheim: Berthold Faber, 1984. 92p. 21cm. Bind. ISBN 3-923228-99-6. Serio Oriento-Okcidento n-ro 19 (UEA). Prezo: 48,60 gld.

La suferoj de la juna Werther apertenas al tiu kolekto de la plej konataj verkoj en la plej konataj eŭropaj lingvoj, kiun oni kelkfoje nomas la monda literaturo. La aŭtoro, Johann Wolfgang von Goethe, sendube estas la plej fama germanlingva aŭtoro, kaj ĉi tiu estas la verko, kiu famigis lin. Preskaŭ tuj post sia publikigo, ĉi tiu letera romano iniciatis modan ondon. Junuloj el la literaturemaj socitavoloj imitadis la ekstreme fajnititan sentemon de Werther, liajn vestaĵojn kaj eĉ lian sinmortigon.

Mi ne multon diros pri la originalo. Kiu ajn literaturhistorio en via loka biblioteko informos vin pli abunde ol povus mi ĉi tie. Ni prefere rigardu la Esperantan tradukon. Ĝi ne estas la unua provo esperantigi ĉi tiun ĉefverkon de Goethe. La tradukinto, Reinhard Haupenthal, en sia enkonduko multvorte mallaŭdas la pli fruajn klopodintojn, ne dirante tamen, ekzakte pro kio tiuj tradukoj ŝajnas al li malbonaj. Post tiom da kritiko oni rajtas atendi de Haupenthal brilan kaj ĉion superantan majstrotradukon, kiu per sia kvalito pravigas la malkaŝan malaprezon kontraŭ la plifruuloj. Sed ĉu? Ni vidu.

Traduki signifas komprenigi tekston al la anoj de alia lingvokomunumo. Kiam la aŭtoro estas Goethe, aldoniĝas kroma malfacilaĵo: Necesas transmeti la ideojn de la aŭtoro ankaŭ en alian tempon. La traduko devas transponti ducent jarojn. Ĉe tiaj malnovaj libroj, se ekzistas samtempa etnolingva traduko (kiu malnoviĝis kune kun la originalo), ĝi ofte ŝajnas pli taŭga ol nuntempaj novtradukoj. Sed Esperanto en la 18-a jarcento ne ekzistis, kaj nuntempe artefaritaj ŝajnmalnovaj lingvoformoj ne kondukas al la celo.

Kiel do traduki altkvalite? Ĝenerala principo de bona tradukado diras, ke la traduko estu **adekvata**. La brita tradukologo Peter Newmark klopodis igi tiun adekvatecon mezurebla, dirante, ke la cellingva esprimo havu en la koncerna stilo la saman statistikan oftecon kiel la originala. Alivorte, oni ne klopodu traduki per vortoj aŭ frazstrukturoj, kiuj **forme** similas la originalajn, sed per tiuj, kiuj en la cellingvo estus elektitaj en la sama situacio.

Laŭ tiu mezuro de situacia adekvateco la traduko de Haupenthal ne estas tiel granda sukceso, kiel oni esperas post tiom da pretendoj. Ĝi estas verkita en tiu individua stilo, pro kiu Haupenthal estas konata. Tiu lingvajo ne estas parolata de kiu ajn lingvokomunumo. Kun la sama rajto kiel ĉiu, Haupenthal tiel klopodas ŝanĝi la lingvon laŭ sia gusto. Sed tia propragusta reformemo, tute permesebla en originala verkado, ne povas harmonii kun la devo de bona tradukisto, reverki kiel eble plej fidele. Ja Goethe estis reformanto en la germana lingvo de sia epoko. Tamen Haupenthal ne aliras la defian taskon en Esperanto respeguli la novigojn de Goethe, sed nur ripetas sian propran dudekjarcentan ŝanĝemon, kiu tute ne rilatas al la tradukata verko. Haupenthal naturisme pruntas en Esperanton multajn novajn radikojn, kun la sola celo eviti uzi la Esperantan sistemon de vortfarado. Se Haupenthal, por pravigi tiun neologismemon, citas Karolon Piĉ, li certe ne trovis tipan reprezentanton de la Esperanta lingvokomunumo. Se li tamen asertas, ke vortoj kiel **nedisigebla** kaj **seniluziigi** kontraŭas la spiriton de Esperanto (dum harmonias kun ĝi **sensepara** kaj **desaponti**), li devus tion pruvi per lingvistikaj analizoj. Tia pruvo malfacilus, ĉar aro da esperantologoj kaj da bonaj verkistoj jam pruvis la malon.

La traduko de Haupenthal do nur povas esti nomata adekvata (en tiu scienca signifo de la termino), se la cellingvo estis la individua dialekto de la tradukinto. Sed por ke valoru eldoni kaj disvendi tian laboraĵon, mi tamen preferus tradukon al la lingvoformo parolata de tiuj, kiuj uzas Esperanton ne kiel unuhoman ludilon, sed kiel interhoman komunikilon.

Klaus Schubert (Nederlando)

Plia paŝo al tutmondeco

Ĉina-Esperanta Vortaro Pekino: Ĉina Esperanta Eldonejo, 1985. 39 + 717p. 19cm. Tole bindita. Prezo: 48,00 gld.

Ĉi tiu vortaro, laŭ sia enkonduko, enhavas pli-malpli 40 000 esprimojn kaj celas du klasojn de uzantoj: enlandaj uzantoj povos ĝin uzi por trovi Esperantajn tradukojn de ĉinaj vortoj, kaj eksterlandaj esperantistoj kiuj jam studis la ĉinan povos ĝin uzi por sin erudi plu. Kvardek mil esprimoj ne estas multaj. (Ordinaraj ĉinaj vortaroj por la skribotablo enhavas duoble tiom.) Tamen la vortaro

Mi ploras nun,
ĉar mi soliĝis.
Mi nostalgias
pri foraj tagoj,
kiam puraj vortoj,
delikataj agoj
varmigis min.

Mi glaciĝis
pro ne ĉeesto
de sunradioj,
kiuj estis vi!
Vi nun vivas
en dimensio alia.
Ĉu vi sopiras min?

Lina Trenner Gabrielli

estas la ĝis nun plej ampleksa ĉina-Esperanta.* Tro granda por poŝo, sed komforta en la mano, ĉi tiu vortaro konvenas kiel unua loko por rapide serĉi esprimon nekonatan aŭ forgesitan. Por ĉino ĝi povus esti taŭga enirejo al PIV.

La vortaro aranĝiĝas laŭ sono kaj por ĉiu esprimo inkluzivas (1) la ideogramojn, (2) la literumadon en la Hanlingva Fonetika Alfabeto, (3) unu aŭ pli multajn similajn Esperantajn esprimojn. Per la finaĵoj de Esperantaj esprimoj, eksterlanda esperantisto povas diveni la plej oftan uzon de la ĉina esprimo (verban, adjektivan ktp), kiu ne estas aparte indikita. Por elekti inter la Esperantaj tradukoj de ĉina esprimo — ekz. "Ĉu *shuòguǒ* estas *frukto* aŭ *granda atingo*?" — la ĉina uzanto sin turnu al tute Esperanta vortaro. Troviĝas ĉe la fino tabeloj (1) de esperantigitaj loknomoj (14p), (2) de landoj, ĉefurboj kaj valutoj (11 p.), (3) de la Hanlingva Fonetika Alfabeto, (4) de dinastioj kaj (5) de kemiaj elementoj.

La vortaro firme baziĝas sur plej oftaj, Fundamentaj, senpretendaj Esperantaj radikoj. Plej interese el la vidpunkto de tiuj kiuj interesiĝas pri la estonteco de nia lingvo ĉiam pli ekstereŭropiĝanta, la redaktistoj evitas enkondukon de neologismoj ĉinaj. Do, manĝbastonetoj restas *manĝbastonetoj*, ili ne fariĝas *kuajzioj* (aŭ *haŝioj*). Eĉ mankas la ĉarma ĉinismo kiu ĥejmiĝis kaj eĉ ŝlagris en Esperantujo dum la Kultura Revolucio: *Dazibao* (ĉina: dàzì bāo). La ĉina lingvo evitas nenecesan enkondukon de eksterlandaj esprimoj per sono, serĉante ĉiam samsencajn elementojn en la ĉina por esprimi la pruntitajn ideojn. Verŝajne la ĉinaj redaktoroj havas la saman senton pri enpruntaĵoj en Esperanton.**

La nova, bone presita, bone redaktita, forte bindita kaj ankoraŭ facile aĉetebla vortaro de Esperanto antaŭenigos nian movadon en Ĉinio. Por ĉiuj ni esperantistoj, ĝi signas feliĉigan plian paŝon al la pleja internaciigo de nia lingvo kaj de nia movado.

D.K. Jordan (Usono)

* Ĝi estas pli-malpli same granda kiel la malvaste havebla kaj malpli facile uzebla *Ĉina-Esperanta Vortaro* de Wáng Bùróng eldonita en Tajvano en 1980. Interese, la elekto de esprimoj en la du estas malsamega, kaj la tajvana vortaro emas uzi pli grandan vortostokon Esperantan ol la pekina. Ni bedaŭru politikon kiu ne permesas kunlaboradon inter tiuj du ĉinaj esperantistaroj.

** Ne ĉiu ĉinismo malĉeestas. La fama azia ludo ĉi tie nomiĝas *vejĉio* (ĉina: wéiqí) apud la pli vaste konata japan-devena nomo *go*, kaj por la ĉina manĝeto *jiǎo-zi* oni proponas la nomaĉon *ĝjaŭzo* apud la malpreciza sed pli konata *raviolo*, sed indikas per kursivaj literoj, ke temas nur pri propono ne jam internacia. Tamen tiaj ekzemploj estas kiel eble plej maloftaj.

Ĉiaj ajn ĝojaj gajaĵoj por lingvoludemuloj

Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!, Stefan MacGill. Roterdamo: Stefeto, 1986. 88p. 21cm. Ilus. Prezo: 9,30 gld.

Esperanto ja estas vivanta lingvo, kaj tiu nova verko el la sorĉista kuirejo de Steĉj' pruvas tion vortludante, cerbumigante kaj ridigante. Ĉu vi ankoraŭ ne scias, ke ekzistas semantika inflacio? Ĉu ĝenas ankaŭ vin, ke Esperanto ne estas complete fonetika — ne havante sonon por po ĉiu interpunkcia signo? Ĉu vi interesiĝas pri la belga lingvoproblemo? Aŭ pri nia Movado kaj ties kuriozaĵoj? Nu, dek du jam podie prezentitaj monologoj kaj skeĉoj kunigitaj en oranĝkolora libreto atendas vin.

Ke tiu libro ĉefe taŭgas nur por progresintoj, prave indikas la titolpaĝa teksto, kiu karakterizas la enhavon esti "tute sen ekzercoj kaj demandoj". Ja necesas cerbumi por kompreni kio estas "fnaŭoj" aŭ "mknaŭinado" aŭ "vicitaniniviaticinstigo". Sed, eltrovinte tion, oni tuj enamiĝas. Jen, do, 88-paĝa amuzilo, = am-uzilo en la okuloj de skeĉserĉisto, kiu ja ĉiam estas skeĉserĉserĉisto aŭ eĉ


skeĉserĉsorĉisto. Infektiĝi ĉi tie estas facila afero — sed, karaj legantoj en la tuta mondo, atentu, ĉar temas pri dumviva malsano. Ĝi malebligas vin legi tekston sen vortludi. Tute kiel glitkuri — unue timo pro la glitfalo, poste entuziasmo kaj fine la deziro ne ĉesi.

Kompreneble ne ĉiu ŝatas glitkuri, same kiel estas iuj, kiuj ne ŝatas skeĉsercorĉi. Tamen, ĉu ni ne ĉiuj ludas uzante lingvon? Kaj krome Esperanto estas lingvo, kiu fakte ludigas nin per siaj tabelvortoj (kiu ja ne jam ĝoje lengerariŝ dirante "mies" aŭ "ŝies"?), per la afiksoj (kiu ne ŝatas esprimojn kiel "bonan genokton", "iometege" aŭ "ica" = malmalica?), per sia tuta strukturo (kiu ne ridas pri s-ro C.E.R. Bumy kaj liaj vortoj "timpó, tampo, tompo" en la libro *Lingvo Stilo Formo* de K. Kalocsay?). Esperanto estas ĉiela lingvo, kaj en la senco de "malinfera, dia, brila" kaj en la senco de "ĉiumaniera". Stefan MacGill estas pruvanto de tio,

kaj krome montras, ke li bone kapablas desegni, matematikumi kaj moki pri si mem kaj pri sia gepatra lingvo.

Sengena, gentila, gusta Streč' eč, Stečj-skeč'! —
gojgeme guu gin giuj — pardonu! — čiu.

Claus J. Güntel (Rejnlando/FRG)



Oficiala Informilo

MEMBROSTATISTIKO

En la komentoj pri la membrostatistiko de 1986 (*Esperanto* 1987, p.59) ni alvokis al kreo de inda membronombro en la Jubilea Jaro. Provizoraj ciferoj fine de majo estas tre kuraĝigaj: 6321 individuaj membroj, t.e. 166 pli ol fine de majo 1986. Jam 60 landoj transpasis sian definitivan rezulton de 1986 kaj aldoniĝis du novaj landoj: Filipinoj kaj Gvatemalo (po 2). Ĉu ni atingos la limon de 7000? Tio nun estas tute realisma celo. Necesas nur eta ono de la varba entuziasmo de Haitio, kie la membraro subite saltis de 2 al 16!

PATRONOJ DE TEJO 1987

Italo: Norberto Saletti. Gîs nun: 51.

SOCIETO ZAMENHOF 1987


Argentino: Rudolf G. Calógero. Aŭstralio: Tim A. Einihovici; L.V. Scott; Marjorie Duncan; Ralph Harry; Sylvia M. Burkitt. Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: Eliza Kehlet; Elfriede Ernst; Jules Verstraeten; Karel van Steenberghe; L. Dreze; Léa Bernaerts-Toussaint. Brazilo: Elvira Fontes; Francisco de Souza Almada; Marija Pozder Almada; Álvaro Rabêlo; Ant. de Souza Barbosa. Britio: E.E. Mallett; Karolino Gilmore; Nassif Isaac; Wilfrid G. Atkinson. Danlando: Ejnar Hansen; P.O.P. Andersen. Finnlando: Aarne Ratalahti; Eino Pynnönen; Harri Tuomola; Irma E. Heikkilä; Juho Pykkönen; Sirkka Mattlin; Terttu Östermann; Vuokko Tellervo Heinäsuo. FR Germanio: Harry Bily; Bruno

Vogelmann; Christel Siffrin; Elfriede Kruse; Ellen Eggers; Elise J.F. Woller; Erdmann Fritsch; Martin Gründler; Helene Hiebel; Hans Schütt; Helmut Welger; Julie Winter; Helmut Klünder; Marieta Moschner; Jean Prager; Dieter Vogelmann; Peter Weide; W. Gscheidel; Werner Heinrich; Margarete von Waldowski. Francio: Alexandre Maczkowski; Eija-Liisa Chevalier; Emilienne Vanneau; Gaston Waringhien; Gerard Peet; Pierre Guérout; Jack-André Rousseau; Jean-Paul Beau; Odette Bernet; Paul Coulet; Raymonde Perault. Hispanio: Josep Castelltort i Riba; Ricardo C. Monterde Gomez. Honkongo: Ian Jackson. Islando: Hallgrímur Saemundsson; Jóhann E. Bjarnason; Lovisa Óskarsdóttir. Italio: Clara Gubbioli Carioli; Medardo Biagi; Michele Mariano. Japanio: Isamu Yamaga; Kôiti Simizu; Takeo Sugano; Syozi Hosonuma; Tosihide Kuwahara; Toyozo Nisikawa; Yosimi Umeda. Jugoslavio: Jovo Djurić; Jožica Židanik. Kanado: Dorothy M. Hawley; Edward William Woodruff; Frank G. Hanson; W.G. du Temple; Margaret S. Vincent; Olga du Temple. Korea Resp.: S-ro Han Moo-hyup; Yung-myung Kim; Choong-sik Chang. Nederlando: M. van Bentum-v.d.Broek; Dini Kappert; Gertrudis C.A.M. Dercks; Evert J. Woessink; G.F. Makkink; H. Smits; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; Louise Adelaar; H.C. Luijke; M.C.J. van der Graaf; M. Meijwes; Truus Mantingh; Robert Moerbeek; S.A.K. van der Zee; Sija van Wijngaarden; Akiko Ūsusink-Nagata; Simon P. Smits; W.A. Verloren van

Themaat; W.C. Keizer; Willy Keizer-Rosenkrantz; Gerda H.M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Agnete Anjer; Kjell Peder Hoff; Olaf Maeland; Pepita de Caspary; Kap. Vidar Vik. Nov-Zelando: D.J. Langman; John Charles Rapley. Svedio: Maja Ahlström; Åke Florbäck; Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Gunnar Börjesson; Sten Axel Broman; Dora Viola Andersson; Edla Nilsson; Einar Rasmussen; Eugen Rytenberg; Gunnar Gällmo; Gustav Nygård; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Hildur Södergren; Karl Axelsson; Karl G. Lennart Lagerkrantz; Lennart Svensson; Leif Holmlund; Malte Smith; Nils Olsson; Olle Olsson; Ragnar Hjorth; Regina Emson; Gunhild Tistad; Tore Johansson; William Malmsten. Svislando: Margrit Guldin. Usono: Arnold Victor; Frederik J. Belinfante; Bruce Arne Sherwood; Alberta Seabold Casey; Cecilia Peterson; Charles W. Tustin; Dorothy Holland-Kaupp; Gertrude Novak; Thomas H. Goodman; Humphrey Tonkin; Julius J. Manson; Joseph Gamble; Elizabeth Manson; Lucille C. Harmon; L.A. Walther; Margaret L. Barkley; Moshe Lewin; Pauline Ledeen; Ruth Culbert; William Solzbacher; Sidney S. Culbert; William R. Harmon; William H. Schulze; Julius Balbin. Venezuelo: Christiane Brossaud. Ĝis nun 171.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Kanarioj: Kristina Krause de Goralski. SUBTENTANTOJ (minimumo \$25): Japanio: Rintarô Taki.



**72a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Varsovio (Pollando),
25a de julio — 1-a de aŭgusto 1987.
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: p/a Pola Esperanto-Asocio,
Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1, Pollando.**

Internacia Kongresa Universitato: Tiu populara scienca institucio, ludinta gravan kaj ankoraŭ kritike ne aprezitan rolon en la evoluigo de la faka lingvaĵo en Esperanto, havos sian propran jubileon en Varsovio, ĉar tie okazos ĝia 40a sesio. Tial por servi kiel Rektoro de IKU estis invitita prof. Juan Régulo-Pérez, unu el la plej kolosaj kontribuintoj al la Esperanta kulturo dum la pasintaj jardekoj. Jen alfabeto la nomoj de la 20 prelegantoj el 12 landoj: W. Auld, V. Benczik, M. Boulton, M. Dobrzyński, H. Eichhorn, R. Hauger, S. Kawamura, L. Kordylewski, E.D. Krause, R. Lewin, U. Lins, H.D. Maas, C. Mallia, B. Mészáros, So Gilsu, A. Vaitilavičius, A. Wandel, J.C. Wells, B.A. Wickström, A.P.M. Witkam.

Arta programo: LKK nun traktas pri prezento de entute 20 diversaj teatraĵoj dum la kongresa semajno! La muzika parto de la programo estas eĉ pli varia kaj abunda. Simile pri dancensembloj kaj korusoj. Sep muzikensembloj helpas al la kongresanoj danci. Prezentiĝos du tutvesperaj filmoj, estos Balo kaj foireca interkona posttagmezo... La 72a UK verŝajne havos la plej imponan artan kaj kulturan programon ĝis nun realigitan en niaj Kongresoj.



Palaco en la parko Lazienki atendas kongresanojn.

Ĉiĉeronoj: La kongresa vojaĝagentejo Orbis organizis meze de majo apartan tritagan seminarion por pli ol 80 vojaĝgvidantoj, kiuj en Esperanto priservos la kongresanojn en Varsovio. Tamen, la utiligo de Esperanto dependas ankaŭ de la lingvorajta konscio de ĉiu unuopa kongresano.

Ekskursoj: La tuttagaj, urbaj kaj vesperaj ekskursoj montriĝas esti tre popularaj, tiel ke estas en kelkaj kazoj minaco superi la maksimumajn nombrojn. Restas ankoraŭ lokoj en la vespera ekskurso EV2 kaj ĉiuj postkongresaj ekskursoj krom EP11.

Loĝado: Restas ankoraŭ iom da lokoj en hoteloj, precipe en la kategorioj H8, H9, H15 kaj H16. disponeblas lokoj ankaŭ en la plej kostaj kategorioj H1, H2 kaj H4. Ĉi-

uj limdatoj jam pasis, kaj se vi ne mendis vian loĝadon, faru tuj por ne riski resti sen loĝloko dum la Kongreso.

Kampadejoj: Eblas kampadi dum la Kongreso kaj eblas mendi lokon kun antaŭpago al la roterdamaj kongresaj kontoj. Jen la prezoj: restado en kampadejo por persono por nokto po 9 guldenoj, loko por tendo ĝis-4-persona por nokto po 7 gld., loko por tendo pli-ol-4-persona por nokto po 8 gld., parkloko por aŭtomobilo por nokto po 7 gld., parkloko por motorciklo por nokto po 4 gld., loko por loĝaŭtomobilo por nokto po 15 gld., loko por ruldomo por nokto po 17 gld. Se vi faros vian kalkulon kaj antaŭpagos restadon en kampadejo, vi ricevos invitilon kiu liberigos vin de la deviga monŝanĝo.

Kongresa libro: Interalie pro malbonaj spertoj pri la poŝtaj servoj en pluraj landoj (Svedio, Finnlando, Italio, Usono, Brazilo) rilate la ekspedon de la *Dua bulteno*, la *Kongresa libro* distribuiĝos nur ĉe la alveno en Varsovio. Ni havas ankaŭ aliajn problemojn ĉi-rilate pro la grandeco de la kongresa adresaro, kiu ĉi-foje okupos plurajn centojn da paĝoj, tiel ke ni trovas nin kvazaŭ redaktantaj telefonlibron.

Tago de la Paco: Konforme al la lastatempa tradicio, ankaŭ la 72a UK havos apartan Tagon de la Paco, kun la temo "Paca kunvivado kaj lingva egaleco". La programon gvidos s-ro Y. Umeda, vicprezidanto de UEA, kiu antaŭvidas trakti la temon per prelegoj, diskutoj, filmo, koncerto ktp. Kvankam la Tago de la Paco estas antaŭvidita por lundo, la 27a de julio, ankaŭ en la 29a de julio okazos aparta pac-manifestacio en Bjalistoko, kien unu el la tuttagaj ekskursoj gvidos pli ol mil kongresanojn.

Vizoj: Ĉiu kongresano, kiu antaŭmendis pere de la kongresaj servoj sian restadon dum la kongresa semajno en Varsovio, ricevos baldaŭ invitleteron de Orbis, kiu helpas akiri polan vizon kaj esti liberigita de la deviga monŝanĝo ĉe la eniro en Pollandon. Havu paciencon ĉi-rilate, ĉar ankaŭ Orbis devas trakti milojn kaj milojn da mendiloj. Tamen, se vi frue forlasos vian loĝlokon kaj volas antaŭ tio akiri vian vizon, informu nin en Roterdamo kaj ni faros nian eblon, ke vi rapide ricevu la invitilon.

Statistiko jam rekordas: ĝis la fino de majo al la Kongreso aliĝis 5 026 partoprenantoj el 59 landoj. La aliĝoj are venadas ĉiutage ankoraŭ, tiel ke la Jubilea Kongreso ne nur superos ĉiujn ĝisnunajn rekordojn sed ankaŭ stariĝos novajn malfacile supereblajn. Estas aparte ĝojige konstati, ke ankaŭ la nombro de la reprezentitaj landoj en si mem estas ĝisnuna rekordo, al kio pleje kontribuas deko da afrikaj landoj, kiuj unuafoje aperas en niaj Kongresoj. El la laŭlanda statistiko ni mencias ĉi tie nur tiujn landojn, kiuj imponas, ĉu per la absoluta, ĉu per la relativa nombro de aliĝoj: Aŭstralio 23, Belgio 102, Brazilio 65, Britio 110, Bulgario 421, Ĉeĥoslovakio 257, Ĉinio 18, Finnlando 109, FR Germanio 169, Francio 258, Germana DR 114, Hispanio 70, Hungario 424, Irano 30, Israelo 28, Italio 117, Japanio 273, Jugoslavio 154, Kanado 23, Korea Respubliko 12, Malto 14, Nederlando 166, Norvegio 48, Pollando 1 311, Soveta Unio 79, Svedio 183, Usono 117.

● **Irlando:** En Dublino la 23/24an de aprilo okazis simpozio pri la malpli instruataj lingvoj de Eŭropo, organizita de la Internacia Asocio por Aplikita Lingvistiko (AILA) kun la subteno de Unesko. Esperanto-Asocio de Irlando sukcesis havigi inviton por prezenti ekspozicion ĉe la simpozio, kaj dank' al la helpo de alilandaj esperantistoj povis montri lernolibrojn kaj literaturon el 27 eŭropaj landoj. Dum la diskuto d-ro Y. Peeters de AILA (ne-esperantisto) memorigis la Unesko-representanton pri la rolo de UEA, aparte pro la lastatempe aperinta *Plurilinguisme et communication*. Laŭ lia takso, "La dekstra mano de Unesko ne scias, kion faras la maldekstra..."

● **Sovetunio:** Entute kvar Esperanto-klubo nun ekzistas en la urbo Volgograd, kaj alia en la apuda urbo Volĵskij. La loka movado funkcias kiel fokuso de la tuta volga regiono, eldonante dumonatan informilon primovadan *Eksciu, ke...* kaj organizante junularajn kaj familiajn tendarojn kaj kunvenojn. Baldaŭ okazos ekspresa Esperanto-kurso por eksterlandanoj — precipe triamondanoj — studentaj en volgogradaj lernejoj.

● **Brazilo:** Eldonejo "Brasiliense" lanĉis la 9an de aprilo novaneron de sia serio "Primeiros Passos" (Unuaj Paŝoj), *O que é Esperanto* (Kio estas Esperanto). La libro trafe prezentas la politikajn kaj ekonomiajn aspektojn de la monda lingvo-problemo kaj ĝian solvon pere de Esperanto. Aŭtoris ĝin Isabel Oliveira Santiago.

● **Israelo:** Prof. Ezra Cion Melamed, kiu en sia juneco aktivis pri Esperanto en Jerusalemo, ricevis la ĉi-jaran prestiĝan Premion Israelo pro siaj studoj pri la Miŝnao. Kiel multaj, prof. Melamed kabeiĝis dum la jaroj de naziismo. Grupo de esperantistoj tamen vizitis lin dum sia tria sinsekvajara partopreno en la Jerusalemaj Marŝadoj, kaj atestas, ke li ankoraŭ scipovas Esperanton.

● **Hispanio:** Pedro I. Antequiera Gldo., la delegito en Campo-de-Criptana, pretigas 16-prelegan turneon kaj aŭdovidan ekspozicion pri Esperanto kaj la movado, por iri tra la Manĉlanda Kastilio en la aŭtuno. Li krome raportas pri ses novaj kursoj (du per MF-radiostacioj) en la regiono.

● **Italio:** "Finfine Esperanto eniris, kvankam nur prove, la roman universitaton kaj la tute ĝustan fakon, tiun pri lingvistiko," raportas Renato Corsetti. Sekve de publika malkonsento kun roma profesoro pri la lingvo-problemo en Eŭropo kaj Esperanto kiel solvo, kaj pro tuja kaj vigla reago de italaj esperantistoj, estis eble interkonsenti kun li pri serio de priesperantaj prelegoj kadre de la "lingvistikaj lunĉoj" de tiu fako. La 30-opa publiko ĉe la prelegoj (faritaj de la fakuloj Pennacchietti, Carlevaro kaj Wells) montris sin tre kontenta, kaj evidente la prestiĝo de Esperanto kreskis je kelkaj poentoj en tiu grava medio.

● **Britio:** La mondserva programo de la brita radio (BBC) dediĉis kvin minutojn la 22an de aprilo al informoj pri Esperanto, okaze de la jubilea brita kongreso en Abergavenny, Kimrujo. La parolanto menciis interalie la ĉeston de pli ol 50 poloj inter la 430 kongresanoj, kaj la grandecon de la subtena grupo en la brita parlamento (pli ol 200 homoj).

● **Ĉinio:** Televida kurso pri Esperanto jam funkcias en la urbo Shenyang, dank' al la laboroj de la Shenyang-a Esperanto-Asocio. Baldaŭ sekvos programo en la provinca televidstacio de Liaoning, sub prizorgo de Liaoning-a Esperanto-Asocio.

● **Brazilo:** La 14an de aprilo, okaze de la datreveno de la morto de Zamenhof, deputito Denisar Arneiro parolis pri Esperanto antaŭ la brazila parlamento. Li substrekiis la aktualan uzadon de la lingvo apud ĝia historio kaj estonteco, kaj finis citante la opinion de Rudolf Diesel, inventinto de la dizel-motoro, kiu laŭdis Esperanton kiel "logikan kaj genie simplan".

● **Malta literaturo:** La *Antologio de maltaj poetoj*, kiun ni menciis en la januara numero, realiĝis dank' al ne la svisa sed la sveda Esperanto-federacio. Intertempe ĝi fariĝis havebla ĉe la Libroservo de UEA (17,70 gld.).

● **Pakistano:** Saeed Farani nelacigeble daŭrigas sian propagandan kaj instruadan aktivadon en Pakistano. Lia Esperanto-eldonejo jam aperigis 11 diversspecajn tekstojn, inkluzive de Esperanta-urdua vortaro.



● **Zairio:** Lufimpu Lukolama, gvidanto de la Kisangania Esperanto-Klubo, verkis ampleksan franclingvan artikolon pri Esperanto por la Alt-zairia ĵurnalo *Boyoma*, kiu aperis en du numeroj en aprilo. La klubo (foto supre) nun ampleksas ĉ. 30 anojn (adreso: B.P. 827 Kisangani, Haut-Zaïre, Zairio).

Fake

● **Ekspozicio:** Dum la monatoj majo ĝis oktobro 1987 okazas granda nacia ekspozicio en la aŭstria urbo Steyr, pri la temo "Laboro — Homo — Maŝino". Petu senpagan ekz. de la prospekto, kune kun Esperanta aldonaĵo, de Esperanto-Redakcio de ORF-Vieno, A-1136 Vieno, Aŭstrio.

● **Literatura konkurso:** La Patronaro de "Fundación Esperanto" anoncis ĉi-jaran konkurson pri infanaj rakontoj, kun aŭ sen ilustraĵoj, celitaj al legantoj de sep ĝis dek jaroj. Sendu tajpitajn tekstojn 2-3-paĝajn en kvin ekz., subskribitajn per pseŭdonimo kun nomo kaj adreso en aparta koverto, al Inés Gaston, P-o de la Constitución, 35, 4-o dcha., E-50001 Zaragoza, Hispanio, ĝis la 30a de septembro (sendodato). Rezultoj anonciĝos la 15an de decembro.

● **Radio:** La internacia anglalingva servo de Radio Kolonjo (Deutsche Welle) dissendis tre pozitivan programon pri Esperanto kaj la Jubileo la 8an de aprilo, en la matena Radio-ĵurnalo (0235 UTC). Ĝi aparte menciis, ke: en pli ol cent landoj oni lernas Esperanton; en Ĉinio centmiloj da homoj okupiĝas serioze kaj entuziasme pri la lingvo; kaj spite zigzagan vojon, la afero tamen progresas. Dankleterojn oni sendu al English Language Service, Deutsche Welle, Köln, FR Germanio.

● **Universitatoj:** La 25an de aprilo la Esperanto-fako de la Universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto festis sian dudekan datrevenon. Ĝia fondinto, d-ro István Szerdahelyi, ricevis laŭdojn pro sia sindediĉo kaj persisto, en la ĉeesto de kvindek de nunaj kaj eksaj studentoj, vicdekano de la universitato k.a. Ĝis nun entute 98 studentoj (inkl. dek ne-hungarojn) diplomigis en la fako.

● **Sciencfikcio:** Eldonejo Albatros en Prago lastatempe publikigis novan romanon de Ludmila Freiová, *Fremdujoj sur la planedo Kvara*, kiel daŭrigon de la antaŭa *Timo sur la planedo Kvara*. En ambaŭ romanoj, Esperanto rolas kiel la dua lingvo de kleruloj sur la planedo.

● **Ekspozicioj:** La Esperanto-Centro de Angers (Francio) kaj la urba biblioteko prezentis grandan ekspozicion inter la 24a de marto kaj la 9a de aprilo. La organizantoj akcentis la tradukitan literaturon de malgrandaj landoj (Estonio, Hungario, Finnlando...) kaj el la ĉina kaj japana, sen forgesi pri originalaj verkoj k.a. ĝenroj. Ekspozicietoj pri filatelo, revuoj, diskoj ktp kontribuis al kompleto.

● **Agado E3:** La konata esperantista organizaĵo por la kontraŭbatalo de vidproblemoj en evoluantoj landoj dediĉas multe da atento al ganaa kliniko, "New Look" (Nova Vido), kiu havas branĉojn en Keta kaj Nsawam (kaj kies receptokartoj portas Esperantan devizon). En tio ĝi kunlaboras kun Ghana-Aktion, germana helporganizaĵo. Ili petas specialan helpon pri la provizado de malgrandaj piloj por aŭdhelpiloj, kiuj neniel estas haveblaj surloke. Sendu kontribuaĵojn al Agado E3, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando.



● **Muziko:** Dimanĉe la 29an de marto 1987 okazis en la preĝejo Maria-Thalkirchen, Munkeno FRG, eklezia koncerto kun posta sankta mezo, ambaŭ en Esperanto. La programo, por preskaŭ 300 ĉeestantoj, inkluzivis la oratorion "Gloro kaj paco" kaj la premieron de la sankta meso de munkenano Fridolin Limbacher. La ĥoro de Maria-Thalkirchen cetere partoprenis la UK en Aŭgsburgo, kaj kontribuos al la programoj de la Varsovia UK kaj la IKUE-kongreson en Ĉenstoĥovo (eble per i.a. la Limbacher-meso).

● **Libroj:** En Londono aperis pollingva libro de Hanna Zamenhof-Zaruski, titolita *Homarano: Sonato por elmigrinto*. Ĝi prezentas la malfacilan adaptiĝon de polaj elmigrintoj al nova socio, kaj enhavas apartan mencion pri Esperanto en la kunteksto de la homarana vivfilozofio. La libro eldoniĝis ĉe "Poets and Painters Press" (ISBN 0 948668 01 6).

● **Mondlingvoj:** La mondlegata usona gazeto *Time* raportis en aprilo, ke FR Germanio entreprenas internacian kampanjon por haltigi la erozion de instruado de la germana lingvo. Laŭ *Time*, la germana estas ĝenerale konsiderata "tro malfacila". La nombro de ĝiaj fremdlingvaj studentoj malkreskis je okono (12,5%) de post 1979.

Persone

● **Robineau:** De pli ol jaro kaj duono, ges-roj Bruno kaj Maryvonne Robineau vojaĝadas ĉirkaŭ la mondo, jam restinte po kelkaj monatoj en Irlando, Hungario, Bulgario kaj Israelo. Ofte ili trovis eblojn paroli, prelegi aŭ intervjui pri Esperanto. En februaro ili atingis Bharaton, kie ili i.a. parolis antaŭ studentaj interpretistoj en delhia universitato kaj aperis en artikolo en la urba ĵurnalo en Kalkuto.

● **Pióro:** Omaĝe al la Jubilea Jaro aperis 87 poemoj de la konata Esperanta verkistino Julia Pióro en du volumoj, Esperanta kaj pola. La eldonkvanto estas nur po 32 ekz. Bibliotekoj povas peti ekzempleron ĉe Jan Pióro, Reja 15/19, PL-05-820 Piastów, Pollando.

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu gulde-
non (unu internacian respondkupo-
non). Pri la enhavo de la anoncetoj
kaj anoncoj ne respondecas la redak-
cio. Ni donas nenian rabaton pro la
aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de
anoncoj bonvolu vidi la duan kovrilan
paĝon.

21-jara litova junulo dez. kor. pri rok-
muziko, DX-umado, literaturo, ling-
voj. Volonte interŝanĝos sondiskojn,
afiŝojn, poŝtmarkojn k.a. Kun kapi-
talismaj landoj nur **registrite**. Gintar-
as Žiaunys, Pk. 422, SU-232004 Vil-
nius, Litovio, Sovetunio.

31- ĝis 57-jaraj lertaj e-istoj (entute 18
personoj) dez. kor. tutmonde pri ĉiuj
temoj; proponas jubilean bulten-
numeron kontraŭ 85 danaj kronoj (al
ĝirkonto 4 42 96 56). Esperanto-
Informa Asocio, Baltorpvej 159, 1 tv,
DK-2750 Ballerup, Danlando.

Nekrologoj

CLIFFORD H. BROWN (1911-
1987), dumviva membro de UEA kaj
delegito en Christchurch, Novzeland-
do, forpasis la 1-an de majo.

GRETCHEN DORIS (1914-1987),
dumviva membro de UEA, mortis
frue en ĉi tiu jaro. Ŝi estis delegito en
Tampa, Usono, kaj fakdelegito pri
radio-amatorismo.

CORNELIA FRIIS (1904-1987), vid-
vino de L. Friis, mortis la 30an de ja-
nuaro en Danlando. Kun sia edzo ŝi
dum pli ol 40 jaroj organizis la inter-
naciajn Esperanto-kursojn en Helsin-
gor, kaj poste ili kune kreis la Danan
Esperanto Eldonejon, nun amplek-
santan centon da titoloj.

D-RO S. COLUM GILFILLAN, ve-
terana esperantisto kaj malnova mem-
bro de UEA, forpasis antaŭ nelonge
en Pasadena, Kalifornio, Usono.

ANDRÉ RIBOT (1917-1987) forpasis
la 10an de aprilo en Marmande, Fran-
cio, kie li estis delegito. Dumviva
membro de UEA, li cetere prizorgis la
entreprenon Esperantaj Francaj Eldo-
noj, sub kiu aperis tiaj klasikaĵoj kiel

Anoncetoj

Vojaĝon tra Azio post la Varsovio UK
faros brazila inĝeniero Paulo Vicente
da Mota. Gastigemaj e-istoj, E-klubo
en Sovetunio, Pakistano, Hinda
Unio, Nepalo, Tajlando, Vjetnamio,
Ĉinio, Koreio, Japanio k.a. aziaj lan-
doj kontaktu lin ĉe Rua T. 47, n-ro
515/402, 74610 Goiânia (GO), Brazilo
aŭ ĉe la UK.

Internacia Vespero en Sheffield. Bon-
volu sendi bildkartojn por ekspozicio
(ĝis la 4a de septembro). Esperanto-
Societo, 175 Hunter House Road,
Sheffield S11 8T2, Britio.

Iranajn poŝtmarkojn kontraŭ irk-oj
sendos, korespondantojn petas 16-
jara Alireza Asadpur tehrani, n-ro 39,
Asadabadi—Sadi street—Agagia 1,
Bolvarsedjamal 91876 Mashad, Irano.

"Survoje al pontokulturo": Materia-
loj pri la kosmopolita humanismo
(homaranismo). Enhavo: *Homara-
nismo hodiaŭ*, *Marburga Manifesto*,
*Universala Deklaracio de Homaj Raj-
toj* (Unuiĝintaj Nacioj), *Deklaracio
pri Homaranismo* (Zamenhof), *Preĝo
sub la verda standardo* (Zamenhof).
Jen la minimumo, kiun ĉiu esperan-
tisto devus scii pri la hodiaŭa
homaranismo! Vi ricevos la verkon
kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de:
Homarana Asocio, Bismarckstr. 28,
D-3550 Marburg, FR Germanio.

Ĉina vicbibliotekisto esperantista dez.
kor. tutmonde pri biblioteko-scienco,
E-historio, kulturo, foto-arto, infan-
pedagogio, interŝanĝos E-librojn. S-
ro Lin Bo, 134 Hao, Huizhou Lu,
Hefei-shi Tushuguan, Hefei, Ĉinio.

Hilary Chapman (brita ĉefdelegito)
ekde la 15a de majo havas novan
adreson: 8 Vardre View, Pentywyn
Road, Deganwy, Gwynedd, Britio
LL31 9UT. Telefon-numero restas
sama: (0492) 83420.

Aktiva membro de E-klubo dez. kor.
pri diversaj temoj kun eksterlandaj e-
istoj: s-ro Nsita Vumi, La Verda Ste-
lo, B.P. 2, Kuilu-Ngongo (Bas-Zaïre),
Zairio.

E-isto serĉas novajn kaj malnovajn
geamikojn. Mi kolektas librojn, gaze-
tojn muzikdiskojn, poŝtkartojn, mal-
novajn monerojn. Mi ankaŭ ko-
respondas pere de sonbendoj. Ĉi tiu
anonco ĉiam validas kaj respondo
estas garantiata al ĉiuj. S-ro Jan J.
Neumann, 3002 Naugatuck Ave., San
Diego, CA 92117-2527, Usono.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Pro la UK, KSM ne funkcios de
julio 15 ĝis aŭgusto 10. La komi-
siito deĵoros ĉe KSM-budo en
Varsovio.

**"Les Hortensias 2", 121 bis,
Blvd. Napoléon III, F-06200
Nice, Francio.**

Fundamento de Esperanto, Hamleto
kaj *Marta* de Zamenhof, *Sen eliro* de
Sartre en la traduko de Bernard, kaj
Dictionnaire Francais-Espéranto de
Léger kaj Albault.

D-RO BORJA PORTELA, dumviva
membro de UEA, mortis printempe
1987 en Pedra-Azul, Brazilo.

TAKAMARU SASAKI (1898-1986),
konata japana dramverkisto, reĝisoro
kaj aktoro, mortis la 28an de decem-
bro 1986 en Tokio, preskaŭ 89jara. Li
kunfondis en 1921 pioniran revuon de
maldekstremaj literaturistoj kaj donis
al ĝi la Esperantan subtitolon *La Se-
manto*. Krome, li tradukis japanen el
Esperanto kaj la franca. Aŭtobiogra-
fioj aperis en la japana (1959) kaj en
Esperanto (*Mia kaŝita vivo. Mallonga
aŭtobiografio de iu neortodoksa espe-
rantisto*, 1978). La nekrologoj, kiuj
aperis en la japana gazetaro, menciis
ankaŭ lian aktivadon en la Esperanto-
movado, kiu fakte daŭris dum sep jar-
dekoj.

MAURICE VANDERLINDEN
(1908-1986) mortis la 27an de septem-
bro 1986 en Deinze-Astene, Belgio,
kie li estis delegito.

Laŭ kontrakto inter UEA kaj la Eldonejo de la Universitato de Kembriĝo (Britio), ni anoncas la aperon de

VETERO KAJ KLIMATO DE LA MONDO

Denis Riley kaj Lewis Spolton

en Esperanta traduko de Kris Long.

Temas pri renoma popularscienca verko, kies anglalingva originalo spertis jam plurajn eldonojn kaj represojn. La libro estas tre riĉe ilustrita (pli ol 150 mapoj, diagramoj, tabeloj kaj fotoj). Provizita de indeksoj, ĝi multrilate plugas novajn kampojn en la Esperanta terminologio.

Vetero kaj klimato de la mondo (1974), Denis Riley kaj Lewis Spolton. El la angla trad. Kris Long. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1987. 132p. Ilus. 25cm. ISBN 92 9017 035 2. **Prezo: 28,50 gld.** (por Nederlando, 30,21), plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Ĉar la nuna ofichavanto foriros ĝis la fino de tiu ĉi jaro, UEA serĉas kandidatojn por la posteno de

Direktor(in)o de la Centra Oficejo


Ni atendas de la dungoto sperton pri oficeja kaj financa administrado, plenan regon de Esperanto kaj vastan konon de la Esperanto-movado, same kiel maturan, diplomatan kaj reprezentan personecon. Kandidatigaj leteroj kun plenaj biografiaj informoj estu adresitaj al Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Se necese, bv. telefoni (010) 436 10 44 (Milojević aŭ Buller).

Aŭdu la voĉon, kiu ravis en Pekino!

JOËLLE RABU:

Omaĝo al Veselin Damjanov

Stereofona disko, 45 t/m, kun la kantoj "La vivo rozas" kaj "La valso patrina". Vancouver, B.C: Goldrush Records GAS 111, 1986. Prezo: 6,00 gld. plus sendokostoj. (Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj).



LA PLEJ EFIKA ARMILO NE ESTAS TIU, KIUN VI SUPOZAS



Por kiu volas liberigi personon, malliberigitan pro siaj opinioj, la skribilo superas la pafilon.

Per la skribilo oni povas kontakti la malliberulon mem, lian aŭ ŝian registaron, gravajn personojn kaj la mondan gazetaron. Kaj registaro, kiu malliberigas siajn kontraŭulojn por silentigi kaj forgesigi ilin, ordinare tre ĝeniĝas pro ĉiu atentigo.

Tio ne necese signifas ke la malliberulo liberiĝas. Tamen la leteroj ofte efikas. Torturo povas ĉesi. La cirkonstancoj povas fariĝi pli elporteblaj. Kaj la persono povas ricevi forton elporti.

Amnestio Internacia estas tutmonda volontula organizo por homaj rajtoj. Ni luktas por liberigo de personoj malliberigitaj pro siaj opinioj, sia kredo aŭ sia deveno kaj kiuj ne uzis aŭ rekomendis perforton; por baldaŭaj kaj justaj procesoj por ĉiuj malliberigitaj pro politikaj kialoj kaj por finfina forigo de torturo kaj mortopuno.

Homaj rajtoj koncernas nin ĉiujn. Ni ne povas lasi la aferon nur al registaroj.

Vi povas subteni la gravan laboron de Amnestio Internacia aŭ partopreni en ĝi.

Helpu al Amnestio Internacia helpi

Amnestio Internacia havas 500 000 membrojn kaj subtenantojn en pli ol 150 landoj. Ankaŭ vi povas partopreni. Se vi ne trovas la organizaĵon en via lando, sendu la respondilon al la centra oficejo en Londono.

Por **membriĝi** en aŭ plu **informiĝi** pri Amnestio Internacia, sendu vian nomon kaj adreson al:

Amnesty International, International Secretariat, CMD, 1 Easton Street, London WC IX 8DJ, Britio.

CENT JAROJN ESPERANTOLOGIO

Internacian simpozion interlingvistikan
"Cent jarojn esperantologio" okazigos Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj kaj Bulgara Esperanto-Asocio de la 4a ĝis la 9a de oktobro 1987 en Internacia Esperanto-Kursejo — Pisanica (Bulgario).

Ĉiu interesiganto povas aŭdi interesajn prelegojn de monde elstaraj interlingvistoj kaj esperantologoj.

Matene — serioza laboro

Posttagmeze — interesaj ekskursoj

kulturaj programoj

amuzoj

en pitoreska montara regiono kun mola dum la aŭtuno klimato.

Kotizo: 180 gld. ĝis 31 julio; 220 gld. ĝis 15 septembro (pagenda al UEA por la konto de BEA). La kotizo inkluzivas ĉiujn programojn, unuarangan hotelon, tri manĝojn tage kaj veturadon de Sofio ĝis la kursejo kaj reen. **Aliĝilon** sendu al BEA, Pk. 66, BG-1000 Sofia, notinte n-ron kaj daton de pagdokumento. **Aliĝontoj el soc. landoj** pagos surloke, sed anticipe devas sendi aliĝilon al BEA (por ISI).

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

PLURILINGUISME ET COMMUNICATION

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

Fokuso

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm

Jarabono ĉe UEA 24 gld.

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTERNACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

Jugoslavia Esperanto-Ligo

Kroatia Esperanto-Ligo

Universala Esperanto-Asocio

"100 jaroj de Esperanto-Kulturo"

ZAGREB 2-9 AŬGUSTO 1987

11 TEATRAĴOJ — 8 PUPTEATRAĴOJ — KONCERTOJ DE E-MUZIKO — AMPLEKSA EKSPozICIO PRI ESPERANTO — ESPERANTO EN TV, FILMO KAJ RADIO — SCIENCA SIMPOZIO — FOIRO DE ESPERANTAĴOJ — VILAĜA FOLKLORA FESTO — MULTAJ EKS-KURSEBLECOJ DUM KAJ POST LA ARANĜO

Kial ĝuste prikultura aranĝo okaze de la centjariĝo? Kaj ĉu hazarde en Zagrebo? Ĉu la esenco de nia movado ne estas ĝuste kultura misio realigata per neŭtrala lingvo? Kio ja estas niaj ĉefaj atingadoj se ne ĝuste la kulturaj: literaturo, tradukoj, libroj kaj lingvo mem? En kio ja konsistas la ĉefaj celoj de la Movado se ne en lukto por nova kultura ordo en la mondo? Jen la kialoj kiel celebri la centjariĝon ĝuste kulture. La aranĝo "100 jaroj de Esperanto-Kulturo" en Zagrebo tial klopodas prezenti al la partoprenantoj la reprezentan retrospektivon de la kulturaj atin- goj de la Movado en lastaj cent jaroj kaj diversitajn frandaĵojn kultur-artajn en Esperanto kadre de la riĉa kaj varia programo. Estu certaj ke en Zagrebo regos la etoso hejma por ĉiuj esperantistoj kaj sentiĝos la reeĥoj de nia jam centjara tra dicio. Krome ĝi estos rekta postkongresa plidetalingo de la Varsovio temo kun aparta akcento je la rolo de Esperanto en pliproksimigado de naciaj kulturoj. La urbo Zagrebo certe kapablos plenumi sian rolon: longjara Esperanto-centro kun pluraj societoj, radio-elsendo, teatra grupo, eldonejo de libroj kaj revuoj kaj miloj da esperantistoj: nepre vizitinda loko por ĉiuj kiuj troviĝas tiu mondparte. Ankaŭ vi ne preterlasu la okazon viziti ĝin. La Informa Bulteno kun la detala programo de la Aranĝo, distra kaj turismaj programoj kaj la aliĝilo, estas senpage havebla ĉe la organizanto:

Kroatia Esperanto-Ligo YU-41000 Zagreb, Amruŝeva 5/1 Jugoslavio.

Bonvolu atenti, ke ĝis la 31-a de majo 1987 validas speciala rabato por la loĝado.

